

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

ALJOŜA

•
LINGVO KAJ
KOMUNIKADO

•
VIRINA KOMISIONO
DE MEM

•
SEPTEMBRA POEZIA
PAGO

•
BET JUBILEAS

•
ESPERANTAJ
BIBLIOTEKOJ

•
LINGVAJ PROBLEMOJ

•
INTERNACIA SOMERA
E-UNIVERSITATO

•
NIAJ AKTIVULOJ

•
ENLANDA MOVADO



JARO 52 • N-RO 5 • MAJO • 83



ALJOŜA

S. TOROPCEV

Falis li sur la teron bulgaran,
falas li — juna kaj bela,
kun okuloj revemaj kaj klaraj —
pli profundaj, pli bluaj ol maro. . .

Brulodoris minace ĉielo. . .

Li ne estis satano aŭ Dio,
al mistik' li ne kredis naive,
sed komprenis li dum agonio:
„Mia morto naskos la vivon. . .“

Falis li tiel juna kaj bela,
ne leviĝis pro akra doloro.
La okuloj por ĉiam fermiĝis
kvazaŭ ŝtono la koro fariĝis. . .

Li ne vidis la bluan ĉielon,
li ne vidis la pacan aŭroron.
Kreskas ĉe liaj piedoj nun floroj
kaj susuras verdkrona arbaro.

Staras li en la urb' sudbulgara —
nek demon' el fabelo, nek Dio,
simple — brava soldat' sovetia,
de eterna frateco simbolo.

Kaj ĉirkaŭe triumfas la vivo!

K. VANŜENKIN

Ĉu blankas la neĝo unua,
aŭ bruas la pluva torent' —
jen staras sur mont' la statuo, Aljoŝa-statuo—
de rusa soldat' monument'.

Kaj sangas ĝis nun ĉies koroj, doloras la koroj
ĉar post de l' milit' plumboŝtorm' —
nunĉestas el ŝton' botoj liaj,
el ŝton' estas la uniform'! . . .

Ekstermis multege da homoj sennomaj
milit' dum pafad' kaj bombad',
sed ĉiu bulgaro ja scias la nomon
de juna Aljoŝa-soldat'!

Ne povas Aljoŝa en valon kun floroj
descendi al junbulgarin' —
sed ŝi lin ornamas dankeme,
sed ĉiuj ornamas dankeme
per floroj belegaj nun lin.

Ĉu blankas en kampo la neĝo unua,
aŭ bruas la pluva torent'?
Jen staras sur mont' la statuo,
jen staras Aljoŝa-statuo —
de rusa soldat' monument'.

Tradukis: A. TONTI-VOLKOVA

Karaj legantoj,
Ĉi-supre, sur la foto, vi vidas la Monumenton de la
Soveta Soldato sur la Monteto de Liberigintoj en urbo
Plovdiv, kiun oni karese nomas „Aljoŝa“.

Multaj sovetaj civitanoj vizitas la monumenton
dum ekskurso en Bulgario. Kaj iuj verkas versaĵojn
pri ĝi.

Nia samideanino Antonina Tonti-Volkova el Moskvo
disponigis al ni siajn tradukojn de du versaĵoj pri Aljoŝa
— de la poetoj K. Vanŝenkin kaj S. Toropcev. (Al
la versaĵo de Vanŝenkin la komponisto E. Kolmanov-
skij faris melodion kaj ĝi estigis populara kanto).

Interalie A. Tonti estas malnova esperantistino kaj
ŝi estas intime ligita kun Bulgario — ŝia forpasinta
edzo Evgenij Volkov estis persona amiko de prof. Asen
Zlatarov, krome — li verkis biografion de Hristo Bo-
tev en rusa lingvo. Kiel elmigrinto en Bulgario, li
estis aŭtoro da la inĝeniera projekto por akvodukto de
urbo Varna.

La tradukoj de A. Tonti estas esprimo de la bulgara-
sovetia amikeco kaj atesto pri ŝia talento de traduki-
stino.

LA REDAKCIO



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 52

MAJO

5 • 1983

LINGVO KAJ KOMUNIKADO

La problemo pri monda komunikado laŭ sia karaktero ne estas tute simila al la aliaj grandaj problemoj, kiujn la homaro devas solvi en la hodiaŭa kaj morgaŭa epokoj. Malsato, malriĉo, militaj konfliktoj kaj analfabeteco estas karakterizaj trajtoj de la homa mizero. Tamen sen komunikado la homaro ne povas sin direkti al solvado de la bazaj mondaj problemoj. Efika komunikado estas grava antaŭkondiĉo de la paco, bonstato kaj de ĉio, kio levus la vivon de la homaro super la nivelo de nura ekzisto.

La ideo lanĉi Mondan Komunan Jaron estis unue levita en la kadro de la Ekonomia kaj Socia Konsilio (Ekosok). Timante la kostojn de la propono kaj maltrankviligante pri ĝiaj iom vastaj celoj, la ŝtatoj-membroj de Unuiĝintaj Nacioj resendis ĝin al la Sekretariato de UN. De tie la propono revenis en pli malvasta formo kaj post aprobo de Ekosok en novembro 1981 ĝi estis akceptita de la Generala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj. La taskon realigi dum 1983 la programon de la Monda Komuna Jaro estis donita al Internacia Telekomunika Unio (ITU)! La programo pere de diversaj projektoj celas iom post iom plibonigi la inkerhoman komunikadon sur niveloj loka, nacia kaj internacia.

Per tiu decido la Generala Asembleo de UN emfazis unuavice la komunikan teknologion, la aron da sciencaj inventaĵoj, kiuj eksplode revoluciis en la lastaj jaroj la formojn kaj intensecon de komunikado, precipe en kaj inter la industriaj landoj. Indas ankaŭ noti — kaj la laborprogramo de ITU reemfazas la fakton — ke la Monda Komuna Jaro ne estas jaro pri monda komunikado, sed monda jaro pri komunikado.

Krome la homa kaj organiza aspektoj de la komunikado estas egale sciencaj en la maŝinero komunikada. Pro tio la Jaro akcentas sulstrukturajn — tiujn bazajn organizajn rimedojn, ho-

majn instituciojn, sen kiuj la maŝinoj de la komunikado estas senpovaj. Kaj malgraŭ ke la ĉefa emfazo de la jaro direktigas al la nacia agado, multaj aspektoj de naciaj komunikoretoj estas efektive internaciaj laŭ siaj karakterizoj kaj destino — kaj unu el la celoj de la Jaro aparte rekonas tion:

„Starigo de monda komunika reto faros grandan historian atingon, kongruan al ekapero de kolektiva konscio inter la homaro kiel tuto. Post ĝia starigo neniu estos plu izolita for de la nacia kaj internacia komunumo. Monda Komuna Jaro montros kiel gravas tiu atingo por realigo de la celoj de la UN-sistemo. . . por la bono de la homaro kiel tuto.“

En la internacia debato pri informado kaj komunikado, kiu okupas la atenton de Unesko kaj UN jam kelkajn jarojn oni emas apartigi la du problemojn, kvazaŭ la lingva demando ne ĉefus en la komunikado kaj estus iel ignorebla. UEA per ĉiuj fortoj kontraŭbatalas tiun eraran koncepton. Ĝi daŭrigas siajn tiurilatajn klopodojn ankaŭ en akordo kun la Komuna Jaro.

Tial la estraro de UEA decidis, ke la ĉi-jara UK en Budapeŝto estos ĉefe dediĉita al esplorado de la ligoj inter lingvo kaj komunika teknologio. Oni elektis kongrestemon „Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la monda komunikado“. En ĉiuj kunsidoj oni pritraktos la rilatojn inter la teknikaj kaj sociaj, lingvaj aspektoj de la komunikado. Eblos partopreni ankaŭ hungaraj kaj internaciaj organizoj kaj fakuloj, okupiĝantaj kaj interesigantaj pri komunikado, ekspliki sian opinion, prezenti siajn atingojn kaj rezultojn en formo de prelego aŭ ekspozicio. Apoge al la temo oni intencas organizi ekspozicion de komunikiloj.

Sukcesa realigo de la planoj de UEA dum la Monda Komuna Jaro povus esti decida paŝo en la antaŭenigo de la Internacia Lingvo en la antaŭjara periodo.

EN BATALO POR PACA ESTONTO



La honora prezidio de la MEM-Konferenco.

Ĉe la streĉita internacia situacio ĉi-momente ne estas pli grava tasko ol la tasko konservi la mondan pacon. Batalante por realigo de tiu tasko, la bulgaraj esperantistoj, organizitaj en Bulgara MEM-Komitato, donas sian valoran kontribuon, uzante celkonforme la Internacian Lingvon Esperanto en servo de la paco.

La 26-an de marto k. j. okazis ties Konferenco, dum kiu ili raportis pri la atingoj kaj sukcesoj en sia laboro. Ĉeestis 42 aktivuloj kaj respondeculoj pri MEM-aktivado ĉe la distrikta kaj societa estraro de BEA.

Dimităr Haĝiev, prezidanto de Bulgara MEM-Komitato, faris priagadan raporton pri la periodo 1978—1982. Li notis la pli gravajn aranĝojn kaj iniciatojn. Aparte sukcesplena estis la tutlanda MEM-seminario por aktivuloj, okazinta en junio 1979 en Polski Trâmbeŝ. Oni interŝanĝis spertojn kaj konatiĝis kun la modele fruktodona, intima kunlaboro de la loka E-societo „Hristo Kozlev“ kun amasaj neesperantistaj organizaĵoj en la urbo.

La celebrego de la 75-jara jubileo de la fondiĝo de E-societo „Marek“ — Stanke Dimitrov transformiĝis en regionan porpagan manifestiĝon. Oni aŭskultis plelegon pri la celoj kaj taskoj de MEM lige kun la streĉita monda politika situacio. Alia grava pacaranĝo estis

la amasa publika kunveno, organizita dum la 13-a Konsultiĝo de E-organizaĵoj el la socialismaj landoj en aprilo 1980. La kunveno aprobis Deklaron, en kiu oni kondamnis la danĝeran politikon de usonaj imperiistoj al intensigo de la vetarmado kaj manifestis sian pretecon resti fidelaj al la principoj de paca kunkuzistado.

Aktivigi la partopreno de esperantistoj en la agado de lokaj pacdefendaj komitatoj. En la Nacia Komitato pri Pacdefendo la esperantistoj estas reprezentitaj de Hr. Gorov, prezidanto de CE de BEA, kaj N. Aleksiev, honora prezidanto de MEM.

La plej grava momento en la bulgara MEM-agado estis la plenkunsido de CE de BEA, okazinta en junio 1981 en Sofio. Ĝi unuanime aprobis salutleteron al la Supra Soveto de USSR subtene al ties Alvoko „Al la parlamentoj kaj la popoloj en la mondo“ kaj akceptis decidon pri organizo de kampanjo por kolektado de subskriboj sub la Alvoko de Kvaka Esperantista Societo en Londono. Realigante tiun decidon Bulgara MEM-Komitato eldonis sian Alvokon, per kiu ĝi apelaciis al ĉiuj organizitaj kaj neorganizitaj esperantistoj, samkiel al amikoj de Esperanto en nia lando,

meti sian subskribon defende al la paco. Rezulte ĝis julio 1982 estis kolektitaj entute pli ol 103 000 subskriboj el pli ol 100 loĝlokoj. La E-societoj bone organizis la kampanjon kun lokaj pacdefendaj komitatoj kaj aliaj sociaj organizaĵoj. Elstaris la E-societoj: „D-ro L. L. Zamenhof“ — Razgrad (33 000 subskriboj), „Marek“ — St. Dimitrov (7 207), „Hristo Kozlev“ — Polski Trâmbeŝ (6 594), „Ivan Vladkov“ — Drjanovo (5 411). Nadja Ĉiplakova el Sofio sola kolektis 16 225 subskribojn.

Nikola Aleksiev tralegis Programon pri la Estonta Agado de Bulgara MEM-Komitato. Oni direktos siajn strebojn al realigo de la decidoj de la Naŭa Generala Konferenco de MEM, okazinta la 26-an de julio 1982 en Antverpeno (Belgio). Oni plu disvolvos organizan kaj idean-politikan agadon por konigi al la bulgaraj esperantistoj la signifon kaj taskojn


de MEM. La Programo antaŭvidas laboron por preparado de MEM-aktivuloj, organizado periode de E-packunvenoj, celdirektita uzado de la korespondado kaj ligoj kun eksterlando en servo de la paco.

Okazis vigla diskutado pri la raporto kaj Programo. Estis faritaj valoraj proponoj kaj estis dividitaj pozitivaj spertoj.

La Bulgara MEM-Komitato elektis novan estraron: Dimităr Haĝiev (prezidanto), Zahari Ivanov (vicprezidanto), Stefka Markova (sekretariojino, Canko Murgin, Evgeni Georgiev, Maria Taŝeva kaj Veneta Baleva.

Oni unuanime aprobis tekstojn de salut-telegramoj al la prezidanto de MEM, Generala Sekretario de UN, bulgaraj packomitatoj kaj al la Centro de Internacia Infana Asembleo „Standardo de la Paco“.

Evgeni GEORGIEV



VIRINA KOMISIONO DE MEM

Estimataj amikinoj!

Super la mondo daŭre ŝvebas la minaco de nova mondmilito, kiu estus la lasta en la historio de la homaro per sia ĉiondetrua efiko.

Milionoj da homoj batalas por defendi la Pacon, por senarmigo, por senmaskigo de la sangaj militplanoj, por libero kaj nacia sendependeco. Kaj ni virinoj, ni patrinoj, kiuj naskas kaj edukas la novan generacion, devas okupi la unuajn vicajn de tiu sankta pacdefenda armeo. Aparta loko estas tie por ni, esperantistinoj, kiuj regas bonegan rimedon por unueco de la virinoj en la tuta mondo.

Inter la 15-a kaj 20-a de junio 1983 efektiviĝis en Prago, ĉefurbo de Ĉeĥoslovakio, Kongreso de Pacaj Fortoj de la tuta mondo. Ĉi-tiun kongreson celas nia apelacio.

Karaj amikinoj, Mondpaca Esperantista Movado estis alte taksita de la Prezidanto de

Monda Packonsilio, s-ro Romes CHANDRA, pro sia aktiveco en defendo de la paco. Danĝera kaj aventurisma politiko fare de milittrondoj de la kapitalismaj landoj devigas nin agadi maksimume aktive. Ni kontribuu al la Kongreso de Pacaj Fortoj eĉ per niaj bagatelaj agoj, kiuj kune fariĝos riverego de la deziroj por daŭra konservo de la paco. Ni kopiu la senditan rezolucion (aŭ faru la propran) kaj dissendu ĝin al niaj geamikoj-pac batalantoj, aŭ al la homoj, kiuj deziras pacon. La subskribitajn apelaciojn bonvolu sendi al la prezidantino de Virina Komisiono, kiu transdonos ilin al la prezidanto de MEM d-ro Imre PETHES, ano de MPK, dum lia restado en Prago, kiu poste publike transdonos ilin al s-ro R. CHANDRA kaj pere de li al la kongresanoj.

Karaj amikinoj, bonvolu dissendi ĉenletere la apelacion kaj petu, ke viaj geamikoj sendu ilin en ĉiujn urbojn, landojn kaj kontinentojn, por ke partoprenantoj en la Kongreso estu konvinkitaj, ke la tuta homaro subtenas ilian batalon per paco, ke sopiras la pacon. Ĉi tiun amasiĝon de la pacbatalantoj UN ne povas preteratenti, sed male, devas subteni ĝin. Helpu, kaj la pacaj fortoj venkos super malamikoj de la paco!

Amike via **MARIE TURKOVA**, prezidantino de V. K. de MEM, CS-320 29 PLZEN, Vrchlickáho 7. (El „Budapeŝta Informilo“, 2-a n-ro 1983)

AL LA MONDA ASEMBLEO POR PACO KAJ VIVO

Palaco de Kulturo, Prago, Ĉeĥoslovakio

Estimataj pacdefendantoj!

Al via Asembleo rigardas niaj okuloj kaj flugas niaj pensoj, samkiel tiuj de milionoj da niaj samsortanoj, sendepende de tio en kiu kontinento ili loĝas, kun la espero, ke via traktado por daŭra paco fariĝos fruktodona kaj sukcesa! Ke niaj voĉoj, kiuj subtenas vian paccelan traktadon por mondo sen ĉiondetruaj armiloj estu aŭdebla ne nur en la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, sed ankaŭ en ĉiuj ŝtatoj, kies iuj registaranoj agas laŭ la deziroj de armilmonopoloj.

La Monda Packonsilio de antaŭ 37 kaj Mondpaca Esperantista Movado de antaŭ 30 jaroj, manenmane kun ĉiuj prudentaj kaj progresemaj homoj de la mondo, kiuj ŝatas la pacon, ĝis nun sukcese malebligadis la eksplodon de la III-a mondmilito.

La „nova strategio“ pri limigita nuklea milito estas mondskala trompa manovro. Al ĉi tiu proklamo, post klarigo de nukleaj specia-

tistoj, fidas neniun prudentan homon. Ni decide rifuzas ĉi tiun danĝeran malhumanan intencon!

Ni rifuzas dissemigadon de armilbazoj en Eŭropo, Kariba zono kaj en ĉiuj zonoj de Proksima kaj Meza Oriento kaj Azio.

Ni rifuzas malhonestan „nuln malarmigan programon“. Ni postulas pacan traktadon kaj kreadon de zonoj de la paco kaj sekureco sur ĉiuj kontinentoj, maroj kaj oceanoj, por ke nia Blua Planedo iĝu sendanĝera kaj fruktodona!

Ni apelacias al ĉiuj, kiuj la pacaferon konsideras grava.

1. Haltigu tiujn, kiuj puŝas nian mondon al pereoj!

2. Malhelpu sangokovritajn manojn, kiuj sufokas la naciojn de Palestino, Libio, Laoso, Kampuĉo!

3. Ni kuniĝu por forigi la danĝeron de la neŭtrona, nuklea, bakteria kaj aliaj militoj — por ĉiam!

VIVU LA PACO!

LA VOĈO DE LA BULGARAJ VIRINOJ

La bulgara popolo ĉiam estas en la unuaj vicoj de l'batalantoj por paco — tiel vivnecesa por la evoluo de nia patrolando, garantio pri la feliĉo de la nuna kaj morgaŭa generacioj. Ankaŭ la bulgaraj virinoj aktivis por defendo de la paco. Nun, kiam ni informiĝas pri la plej novaj armiloj por amasekstermado, ree nin trapikas maltrankvila tremo, ligita kun la nomoj de la japanaj urboj Hiroŝima kaj Nagasako — simbolo de morto, de katastrofo, kiu neniigos la vivon sur la planedo.

Tial ni — virinoj kaj patrinoj, subtenas la politikon de la socialismaj landoj por daŭra paco. Tial ni spontane aliĝas al la alvoko de l'virinoj el la tuta mondo, akceptita de la Monda Kongreso de Virinoj, okazinta la 13-an de oktobro 1981 en Prago, en kiu oni diras:

„Ĝis nun neniam la danĝero pri nuklea milito estis tiel reala. Ĝi minacas ĉiun virinon, ĉiun viron, ĉiun infanon. Por arimado ĉiunminute oni elspezas 1 milionon da dolaroj. Samtempe milionoj da homoj suferas malsaton kaj mortas rezulte de la malŝparado de vivnecese gravaj rimedoj, kiujn oni elspezas por militceloj. La vetarmado ĉiutage senigas la homon je pano, vestoj, kuracado, lernejoj, laborlokoj. La grandegaj militelspezoj deprezas de la virinoj la kondiĉojn necesajn por atingado de ilia egalrajteco.

Oni devas ĉesigi la vetarmadon!

La nuklea milito povas kaj devas esti ĉesigita!“

Kun malfermo de la kampanjo por kolektado de subskriboj por defendo de la paco en nia lando, la Komitato de Bulgaraj Virinoj alvokis ĉiujn virinojn per sia subskribo kategorie deklari sian decidemon defendi la pacon, aktivi por malpermeso de la dislokigo de novaj nukleaj raketoj en Okcidenta Eŭropo kaj de la produktado de neŭtrona bombo, kontraŭ la plej novaj planoj de la usona registaro enkonduki la militagojn ankaŭ en la kosman spacon. En mitingoj kaj kunvenoj miloj da virinoj esprimis sian maltrankvilon pro la vetarmado.

La bulgaraj esperantistinoj subtenas la ideon pri kolektado de subskriboj por la Monda Asembleo por Paco kaj Vivo, kontraŭ la nuklea milito. La Asembleo okazos de la 15-a ĝis la 20-a de junio 1983 en Prago, Ĉeĥoslovakio.

Ni estas certaj, ke la virinoj de nia planedo, unuiginte siajn fortojn, ne permesos al la militindustriaj profitekuloj kaj nemoralaj politikistoj minaci la pacon. Tial ni pli forte unuigas niajn vicojn por sekurigi serenajn ĉielon kaj pacan estonton al niaj infanoj.

La bulgara virino, etendante amikan manon al la virinoj el ĉiuj kontinentoj, varmege subtenas la politikon, kies ĉefa celo estas konservo de la paco sur la Balkana Duoninsulo, en Eŭropo kaj en la tuta mondo.

Ing. Maria TAŠEVA

MIAJ UNUAJ PAŜOJ EN ESPERANTO

Jam pasis pli ol duonjarcento, sed la rememoro pri miaj unuaj paŝoj en la Esperanta movado kaj pri nia revolucia movado restas ĉiam ankoraŭ freŝaj.

Dum la lernojaro 1926—1927, kiel lernantino en la dua klaso de la Knabina Gimnazio en urbo Vraca, malgraŭ la malpermeso, mi aliĝis al la Esperanto-kurso, gvidata de Radoslav Triĉkov.

La kurso okazis vespere kaj ĝin partoprenis laboristoj el la lokaj fabrikoj, hejmlaboristinoj — kudristinoj kaj trikistinoj, unu juna advokato, unu lernantino eksigita pro komsomola agado el la lasta klaso de la gimnazio, du junaj turkoj, mi kaj la fama revoluciulo Jordan Ljutibrodski — tiam lernanto en Stata Tekstilernejo. Li ne povis regule viziti la kurson pro sia agado kiel gvidanto de junulara grupo. Malgraŭ sia neregula ĉeesto li bone posedis la lingvon. Eble li hejme multe legis aŭ eble pli frue lernis ĝin. Sed kiam temis pri eksterkursaj aranĝoj, ĉefe ekskursoj, li estis organizanto kaj animo de la grupo.

Tiutempe al la gelernantoj estis malpermesite partopreni Esperanto-kursojn. Malgraŭ tio mi plu vizitadis la kurson.

La lektoro Radoslav Triĉkov, verva kaj energia, impona kaj alloga, post nelonge kreis en la kurso amikan etoson. Dimanĉe Triĉkov ĉiam per la helpo de Jordan Ljutibrodski, kiu estis senlaca talenta amasulo, organizis ekskursojn al historiaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo. Tiuj ĉi ekskursoj estis utiligataj por progresema agado, al kiu estis ofte altirataj ankaŭ neesperantistoj. Mi konservis kelkajn fotojn de tiuj ekskursoj.

La kreita amikeco daŭris plu ankaŭ post la fino de la kurso, kiam Jordan Ljutibrodski jam estis membro kaj poste sekretario de

Distrikta Komitato de la nelegala Bulgara Komunista Partio (BKP).

Mi ofte kontaktis kun li, ĉar mi tiutempe estis en la estraro de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo) kaj poste — de BONSS (Bulgara Tutpopola Studenta Unuiĝo). Tio daŭris dum la periodo de majo 1931 ĝis septembro 1933,



Renkontiĝo kun ministoj el minejo Plakalnica

kiam Ljutibrodski forlasis Vraca.

La ĉi tie publikigita foto estas de tiu periodo. Plej supre staras Jordan Ljutibrodski kaj tuj apud li vidiĝas mi. La foto estas farita laŭ iniciato de Ljutibrodski mem post renkontiĝo inter nia grupo kaj laboristoj-ministoj el minejo Plakalnica. Por mi restos neforgeseblaj lia entuziasmo, lia simpla kaj alloga maniero, per kiu li kontaktis kun la laboristoj.

Jam dum daŭro de la kurso Triĉkov preparadis nin por granda antaŭstaranta evento en Vraca — la Nacia Kongreso de la esperan-

tistoj, arango, kiun neniu el ni ĝis tiam partoprenis.

La kongreso okazis en la fino de aŭgusto 1928 kaj en mia konscio ĝi reliefigis kiel grandioza kaj neforgesebla evento. Krom organizajn taskojn en la loka komitato, mi estis honorigita plenumi ankaŭ artajn taskojn — mi devis deklami kaj partopreni spektaklon, kies motivo estis batalo por paco. Interbatalis Glavo, Vero kaj Mensogo.

La plej peza momento ĉe distribuo de la roloj estis, kiu prenu la rolon de Mensogo. Neniu konsentis preni tiun ĉi rolon. La spektaklo estis antaŭ fiasko, kiam intervenis R. Tričkov kaj diris, ke mi, kiel plej juna kaj plej malaltstatura, devas esti la Mensogo.

La spektaklo rikoltis sukceson. Nia kelkmonata laboro por ekposedi perfektan Esperantan parolon trovis pozitivan kaj ĝojigan akcepton.

Nature, por nia sukceso kontribuis ankaŭ nia komika rekvizito, kiu jam ĉe nia apero sur la scenejo gajigis la publikon.

Mi rememoras, ke la granda bulgara komponisto, la blinda akademiano Petko Stajnov, kiu evidente estis delegito de la kongreso, vokis min kaj min karesante, laŭdis min pro la bone plenumita rolo. La nomo de mia rolo tamen longan tempon anstataŭis mian baptonomon.

Mia rolo de helpantino de la organizantoj evidentiĝis ankaŭ en alia ne malpli interesa okazaĵo.

Kiam ni renkontis ĉe la fervojstacio la jam aliĝintajn delegitojn, anoncis sin nealiĝinta grupo — dudek laboristoj el unu fabriko en Ruse. Tio ĵetis en panikon la ĉeforganizanton Tričkov kaj li ordonis al mi: „Zorgu pri la enloĝigo de tiu ĉi grupo!“ Kiam mi kontraŭdiris, ke tio ne estas ebla por mi, li respondis: „Konduku la grupon en vian hejmon, kaj diru al viaj gepatroj akcepti ilin. Se necese, kunvoku la tutan kvartalon!“

Mi subiĝis, kaj, sekvate de la grupo, ekmarŝis al mia hejmo.

Miaj gepatroj konsterniĝis. Ni povus enloĝigi nur du homojn. Tiam la gastoj donis la ideon: „Ni ne estas kapricaj, ni bezonas nur tegmenton super la kapo, nenion alian“.

La problemo estis solvita. Per la helpo de la gastoj ni elportis ĉion el la pli granda ĉam-

bro, poste ni sternis tapiŝon sur la plankon kaj la loĝejo por dudek personoj estis preta.

Kontribuis al la loĝejo ankaŭ la kvartalanaj, kiuj alportis aldonajn tapiŝojn, kusenojn, kovrilojn. Mia patrino komencis knedi kukojn, kvartalanaj alportis multe da fruktoj. Kreiĝis tre gaja etoso.

Kiam fine la „litoj“ estis pretaj, la gastoj sin lavis je la kortfontano kaj feliĉaj ekkriis, ke tiu ĉi kongreso por ili estos komparebla kun neniu alia.

Post la kongreso kaj post la forveturo de la gastoj miaj gepatroj ricevis kolektive skribitan dankleteron kaj mi — albumon kun desegnaĵoj faritaj de ĉiuj gastoj, kun Esperantaj tekstoj.

Iuj el ili komencis sendi al mi progresman literaturon, precipe broŝurojn kaj gazetojn — bulgarlingve kaj esperante. Kaj antaŭ la forveturo du el ili — Dimităr Ivanov kaj Atanas Sopov, donacis al mi Esperanto-Bulgaran Vortaron de H. Bâcvarov — kun dediĉo kaj danko. Kiam mi demandis ilin, ĉu ĝi ne mankos al ili, ili respondis, ke ili jam „formanĝis ĝin kune kun la kovriloj“.

En 1929, kiel membro de la estraro de RMS en urbo Vraca, mi kaj la tuta estraro bezonis marksisman literaturon, taŭgan por junulara publiko. Mi havis la taskon prepari planon de nia ideologia laboro inter la RMS-anoj. Ni estis embarasitaj. Bonŝance, ĝuste en tiu ĉi momento mi ricevis grandan pakadon kun tuta jarkolekto de la revuo de SAT „La Nova Epoko“, kiu tiam estis eldonata en Sovetunio. En ĝi mi trovis abundan materialon koncerne la temojn, kiujn la Estraro devis prilabori. Mia ĝojo estis grandega. Sed la jarkolekto estis sendita nur por provizora uzo kaj mi devis rapidi. Estis longa kaj ne tre facila por mi laboro — traduki kaj kunmeti la referaĵojn.

La tuta nia posta laboro baziĝis sur tiu ĉi materialo. Jen tiel Esperanto tiam servis kiel ponto por nia vasta propaganda marksisma laboro.

Pli malfrue, kiam post malsukcesa kampanjo la RMS-estraro estis arestita (majo—junio 1930) kaj la polico fervore serĉis la materialojn, kiujn ni uzis por niaj referaĵoj, tiuj ĉi materialoj jam estis en Ruse, kaj neniu eksciis, kian rolon ludis Esperanto en nia revolucia agado.

Ekaterina ANASTASOVA-MIĤAJLOVA

LIGOJ INTER SOVETA KAZAĤIO KAJ BULGARIO DUM LA 20—30-AJ JAROJ

La historio de la frataj ligoj inter la laboruloj de Sovetunio kaj Bulgario ne estas plene prilumita el scienca vidpunkto. La malkovritaj de mi en la arkivoj de ambaŭ landoj dokumentoj kaj publikigitaj materialoj permesas prilumi plurajn malmulte konatajn pagojn el la gloraj analoj de soveta-bulgara amikeco laŭ la ekzemplo de la internaciaj ligoj inter Kazaĥa SSR kaj Bulgario en la dua kaj tria jardekoj de nia jarcento.

Pro la faŝisma cenzuro multaj leteroj, libroj, gazetoj kaj ĵurnaloj, senditaj el Soveta Kazaĥio al bulgaraj laboruloj, estis konfiskataj kaj malfacile atingis la adresatojn.

Celante organizi konstantajn kaj solidajn korespondligojn inter la sovetaj laboruloj kaj tiuj el eksterlando, la Tutunia Centra Konsilio de Sovetaj Sindikatoj kaj la sindikataj organizaĵoj en ĉiuj sovetaj respublikoj, inter ili ankaŭ en Kazaĥio, unuflanke, kaj la revoluciaj sindikataj organizaĵoj en kapitalismaj landoj, inter kiuj ankaŭ Bulgario, aliflanke, ekuzis Esperanton kiel rekonitan helpigon por internacia komunikigo.

En marto 1930 la Kazaĥa Sindikata Centro organizis por la fervojistoj de linio Turkestano-Siberio (mallonge: Turksib) en urbo Alma Ata specialan „Korespondan Buroon por Internaciaj Laboristaj Ligoj“. Ĝi iniciatis vigran korespondadon kaj interŝanĝon de literaturo kun la laboristaj korespondantoj en vico da burĝaj landoj, inkluzive Bulgarian.

Tiu Koresponda Buroo kreis intimajn ligojn ankaŭ kun la Laborista Esperanto-Asocio en Bulgario ne rekte, sed per „ĉirkaŭaj vojoj“.

Kion prezentis tiuj „ĉirkaŭaj vojoj“? La korespondaĵoj el Sovetunio, pli speciale el Kazaĥio, estis adresataj al laboristaj Esperanto-organizaĵoj aŭ al individuaj esperantistoj en kapitalismaj landoj, ĉefe Germanio, Francio, Britio. Tie oni metis ilin en novajn kovertojn kaj readresis ilin al Bulgario. Tia maniere la faŝisma cenzuro estis trompata. Aparte granda nombro da leteroj kaj literaturaĵoj pasis tra urbo Lejpcigo pere de la komunisto

Otto Bässler, persona amiko de Ernst Thälmann.

Tiuj ĉi valoraj materialoj pri la socialisma konstruado en Sovetunio, kiel rememoras la verkisto Angel Todorov, aperadis en la bulgaraj progresemaj periodaĵoj. Ĉefe Nikola Aleksiev liveris al gazeto „Pogled“, speciale fondita de la Bulgara Komunista Partio por propagando de la atingoj de Sovetunio, Edevenajn korespondaĵojn kaj aliajn materialojn pere de la ĉefredaktoroj de tiu gazeto — Georgi Karaslavov (akademiano, klasikulo de la bulgara literaturo, forpasinta en 1980), kaj Vladimir Topenĉarov, nun akademiano kaj profesoro de ĵurnalistiko.

La kunlaborantoj de Kazaĥa Sindikata Centro kaj de Koresponda Buroo alte taksis la agadon de la bulgaraj revoluciaj esperantistoj-ĵurnalistoj, antaŭ ĉio tiun de N. Aleksiev — fondinto kaj sekretario de BuLEA, nun heroo de socialisma laboro. Pri tio rakontas la tiama sindikata aktivulo de Kazaĥa Sindikata Centro, nun konata kazaĥa historiisto S. J. Safiro. Li citas sovetan Esperanto-ĵurnalon „Internacia Lingvo“, kiu skribis pri la sukcesa publikigo de sovetaj korespondaĵoj en Bulgario kaj informis pri la persekutoj de la faŝismaj organoj kontraŭ N. Aleksiev kaj aliaj E-redaktoroj. Tiu ĵurnalo en sia n-ro 1 de 1933 informas, ke N. Aleksiev estis arestita kaj troviĝas en Sofia Centra Malliberejo. En sia duobla n-ro 11—12 de la sama jaro ĝi informas, ke N. Aleksiev kaj alia redaktoro — Angel Petkov, estis liberigitaj. La informo finiĝas per la vortoj: „Ni frate salutas la heroajn batalantojn kontraŭ la faŝismo!“

En aprilo 1984 la sama ĵurnalo rakontas pri grandega sukceso inter laboristaj kaj kamparanaj legantoj de sovetaj korespondaĵoj, akompanataj de koloraj fotoj. Kaj lige kun tio la ĵurnalo informas, ke Aleksiev, Mladenov kaj Petkov „denove estas malliberigitaj“.

La aktivuloj de Koresponda Buroo legis

korespondaĵojn el Bulgario antaŭ laboristaj kunvenoj en Alma Ata, en la fervojstacioj de Turksib. Senpere gvidis la agadon de la Buroo kaj la korespondadon kun bulgaraj laboristoj pere de Esperanto la tiama fakestro, poste — respondeca sekretario kaj prezidanto de Kazaha Sindikata Centro Tursun Juvaŝeviĉ Gumabaev (1898—1944).

Dank' al la bone organizitaj ligoj inter la Koresponda Buroo kaj BuLEA en la periodo 1930—1934 la internacia korespondado estis tre efika kaj posedis konstantan karakteron. Sed pro la konspiraj kondiĉoj de agado, truditaj de la faŝisma cenzuro en Bulgario, mi ne povis fiksi la aŭtentikan nombron de la korespondaĵoj senditaj el Kazahio al bulgaraj revoluciuloj kaj tiun de la respondleteroj. Tamen nur en la periodo de 1931 kaj marto de 1932 la kazahaj sindikatoj transsendis al eksterlando 300 kaj ricevis 85 leterojn. Krome, estis ekspeditaj 200 ekzempleroj de sovetaj ĵurnaloj, 160 libroj, 700 afiŝoj kaj flugfolioj (ĉiuj en Esperanto). Pri tio informas gazeto „Kazaha Vero“ de 22-a de aprilo 1932. Granda parto de tiuj korespondaĵoj kaj materialoj estis destinitaj por bulgaraj kamaradoj.

La granda intereso de la bulgaraj laboruloj al Turksib estis provokita de la fakto, ke ĝi estis la dua (post Dnepra hidroelektrostacio „V. I. Lenin“) plej granda konstruaĵo de la unua soveta kvinjara plano, longa 1450 kilometrojn. La konstruado de tiu avangardulo de la socialisma industriigo de Kazahio realiĝis en periodo, kiam kapitalismaj landoj, inter ili ankaŭ Bulgario, estis viktimoj de detruiga ekonomia krizo. Tiamaniere manifestiĝis la grandegaj avantaĝoj de la socialisma sociordo.

Dank' al la intimaj ligoj pere de Esperanto la bulgaraj laboruloj ricevadis objektivan informadon pri la kreo de Karaganda Karba Baseno, pri la malkovro de kupra minejo kaj konstruado de Balhaŝa Kupra Kombinato kaj pri aliaj novaj konstruaĵoj. Laŭ peto de bulgaraj ĵurnalistoj Kazaha Sindikata Centro preparis artikolon pri Kazaha sovjhozo „Paĥta-Aral“, pri la evoluo de la kotonkulturado en la respubliko. „La Malsata stepo transformiĝas en ĝardenon — skribis la sovet-aŭtoro. La sovjhozo atingis grandajn sukcesojn en kreskigo de novaj teknikaj specialistoj, en transformo de la hieraŭaj duondikaj nomadoj en mekanikistojn kaj traktoristojn.“

Pri la rolo kaj signifo de la korespondado inter bulgaraj kaj sovetaj laboruloj rakontas la ekslaboristino el urbo Sliven Tinka Lakova:

„Mi legis tiujn leterojn en niaj sekretaj kunvenoj kaj konferencoj, organizataj en la urbo aŭ en la montaro. La sovetaj kamaradoj liveris al ni tre interesajn informojn pri siaj sukcesoj en la socialisma konstruado. Precipe interesaj estis la leteroj de Sergej Boev.“ Efektive, la juna Sergej Boev, studento de veterinara medicino, nun akademiano en Alma Ata, sendis E-korespondaĵojn pri la socialismaj ŝanĝoj kaj atingoj en tiu ĉi plej postrestinta periferio de la iama Rusa Imperio. Utiligante la Esperantan ĵurnalon „Internacia Veterinara Revuo“, Boev publikigis kelkajn sciencajn artikolojn kaj referaĵojn de la estro de Katedro pri Patologia Anatomio ĉe la Zooveterinara Instituto en Alma Ata. Tio estis fakte la unuaj sciencaj publicaĵoj de kazahaj scienculoj ekster Sovetunio.

Doc. J. L. PORTNOJ,
kandidato de historiaj sciencoj

„BULGARA ESPERANTISTO“ PLU ABONEBLA!

LA REDAKCIO DE „BULGARA ESPERANTISTO“ SCIIGAS AL ĈIuj INTERESIGANTOJ, KE LA ABONADO AL LA ASOCIA ORGANO DAŬROS ĜIS LA FINO DE AŬGUSTO 1983.

ĈIuj, KIUJ NE SUKCESIS ABONI LA REVUON POVAS FARI TION PERE DE LA KANCELARIO, SENDANTE 3 LEVOJN PER POŝTMANDATO AL LA ADRESO DE LA REDAKCIO: 1303 — SOFIO, BUL. ĤRISTO BOTEV 97.

ONI SKRIBU SIAN ĜUSTAN ADRESON, INDIKANTE ANKAŬ LA POŝTKODON.

NE PRETERLASU LA EBLECON ABONI AL „BULGARA ESPERANTISTO“, KIU DISPONIGAS AL VI RIĈAJN INFORMOJN PRI LA LANDA KAJ MONDA ESPERANTISTA MOVADO, LITERATURAJOJN, DISTROJN KAJ MULTAJN ALIAJN INTERESAJN LEGAJOJN!

ĈIU MEMBRO DE BEA — ABONANTO DE „BULGARA ESPERANTISTO“!

23 Septembro

SEPTEMBRA POEZIO

2

Nikola FURNAĜIEV

LUPOJ

Lupar' malsupren ĵetas sin kolere,
en griz-nebuloj semitaĵoj dormas,
kaj ni kun ŝuoj plandumitaj fere
de frumateni iras laŭ la vojo.

Ĉaroj nigraj preter ni trapasas,
plenplenaj de kadavroj jam putrintaj,
kaj ĉe la fino kiel birdo lamas
plej nigran ĉaron ĉevalin' trenanta.

En tiu nigra horo ni ne preĝos —
cindrigis sentoj en animoj nigraj,
ĉe nudaj cindrigitaj vojoj nestas
la nigraj birdoj de horor' mortiga.

En la malica hurlo de lupar' malama,
en la brueĝo de ĉar' malbonaŭgura,
en vento mem, en suno hele flama,
amo brulas, morto kante brulas.

Lupar' malsupren ĵetas sin kolere,
en griz-nebuloj semitaĵoj dormas,
kaj ni kun ŝuoj plandumitaj fere
de frumateni iras laŭ la vojo.

Tradukis: Ljuba BOJAĜIEVA

Asen RAZCVETNIKOV

DRONIGITOJ

1

Post nigra salikar' — forpasas taga or',
kun karesanta ond' alvenas la vesper',
kaj, pafo post la pafo, mutiĝas lace for...
Al dormo vokas jam la steloj de l'ĉiel'.

Kovrite de la musk', de l'nigra glita glu' —
ĉu restos tiu barĝo ĉe l'sama lok' sen fin'?
Ho, kvazaŭ nigra ĉerko sur la malluma flu'
por lasta rekvien' dormige lulas nin!

Al la lumanta urb', kun manoj en katen'
ankaŭ ĉi-nokte ni rigardas kun kortuŝ'.
Kaj ni atendas: ĉu de l'bord' silenta jen
alvokos kun sopiro nin nevidebla buŝ'...

Rivera flora man' sin sternas en silent', —
fabelas bela bril' en la subakva fund' —
ho, kiu en ĉi hor', vundita, post turment',
kiel helega stel' ekflugos al profund'?

Sian floron el purpur'
la maten' malfermas.
Super rosa bord' nebul' —
blanka fum' — sin sternas.

Halt' patrinoj! Haltu jam
en mateno morna, —
en subakva diafan'
ili pace dormas.

Kaŝe nimfoj tien ĉi
naĝis el profundoj
kaj estingis per glaci'
la brulantajn vundojn.

La dronintojn garnis per
algoj kaj kandeloj,
vundajn kapojn kun tener'
kronis per nimfoj.

Ilin kun mallaŭta plor'
kovris per eterno.
Kaj ĉerkegon kaŝis for
en la terinterno.

Haltu, panjoj, haltu do
en dolor' kruela,
ĉi-sekretan kaŝas, ho!
profundego hela.

3

Ni portas florkronojn el branĉoj salikaj kaj kardoj,
en ŝipoj dronintaj sekrete pretiĝas ni nin —
vespere ni levas pafilojn, hakilojn, forkegojn,
kaj rajdas fantomajn kaj blankajn ĉevalojn sen tim'.

Kaj ni senparole sur fundo rivera, en vicoj,
postkuras miragon de lando de ravo kaj lum'.
Teruro tenebras en niaj pupiloj smeraldaj
kaj lumas en ili la serpo kolera de l'lun'.

Pri flora maten' ni memoras, pri kantoj, kuraĝo,
pri Lom, la maljuna, pri l'flama decida batal',
pri l'lasta atak' ni memoras post la vilaĝo,
pri l'lupaj dentegoj de tiu terura fatal'.

Kaj kiel vunditaj moluskoj, tenere kaj garde
prizorgas trezorojn en muska profundo de l'mar',
jes, ankaŭ ni tiel portadas en koro sopiron
frostintan je perlo, kristalo kaj blanka opal'.

Kaj tiam la fiŝoj el siaj kavernoj eliras
kaj nin persekutas rabiste survoje en svarm' —
kaj ili kruele, sovaĝe nin mordas kaj ŝiras
kaj rongas aŭde de nia puŝaĵo el karn'.

Kaj foje, en iu printempa vesper', dum levigos
sur bluo de l'monto la luno en puro kaj hel',
sennomaj fiŝistoj ektrivos sur sia manĝtablo
kun bruo kaj ĝojo la grajnojn de stranga juvel'.

Subite en ties anim' niaj kantoj eksonos,
kaj nia soifo al suno, vastaĵo, liber' —
kaj hele sur fruntoj sunbrunaj iliaj ekbrilos
trans reto el faltoj, helega kaj ruĝa, la stel'.

Tradukis: Asen GRIGOROV

BET JUBILEAS

En majo ĉi-jare la Bulgara Esperanto-Teatro (BET) notas gravan datrevenon: kvaron-jarcenton de sia ekzisto. Tio estas tre konvena momento por ĵeti rigardon al ĝia pasinto kaj al ĝia estonto.

Kiel naskiĝis BET?

Ĉio komenciĝis per unu kurso de Esperanto, organizita en 1957/58 en teatro „Trudov Front“, kiu dum la 50-aj jaroj prezentis siajn spektaklojn en salono ĉe la angulo de bulvaroj V. Zaimov kaj Kl. Gotwald en Sofio. La kurson gvidis Mihail Langov, nun jam forpasinta. Surbaze de tiu kurso kreiĝis la unua konstanta aktora trupo en Bulgario, kiu aperis antaŭ la sofia E-publiko la 19-an de majo 1958. Tio estas la naskiĝdato de BET.



La bulgaraj geaktoroj Belka Beleva kaj Anani Anev, en sceno el la teatraĵo „Kara mensogulo“, prezentita en Londono, 1971.

La unua spektaklo ampleksis la komedion „Analfabeto“ de Branislav Nuŝiĉ, „Divorco“ de Nadejda Slonova kaj „Por la paco“ de bulgara aŭtoro. En ili rolis la geaktoroj Belka Beleva, Kostadinka Nedeva, Elena Penkova, Valentina Borisova, Maria Andonova, Anani Anev, Gerasim Mladenov, Georgi Kerelezov, Pavel Dubarev, Stefan Konkov kaj Nikola Krăstev. Programero estis ankaŭ la poemo „Kaliopa“ de P. K. Javorov, kiun recitis Belka Beleva. La tutan spektaklon reĝisoris Stefka Prohaskova.

Dum la sekvaj jaroj al tiu ĉi konsisto aliĝis la geaktoroj Mihail Cobanov, Miŝo Zdravev, Konstantin Dimĉev, Olga Popova. Post la fermo de teatro „Trudov Front“ en 1964, la unua konsisto de BET disfalis, sed kelkaj el

la geaktoroj restis fidelaj al la E-movado ĝis nun.

En la somero de 1958 la unua spektaklo estis prezentita en la kulturprogramo de la kongreso de bulgaraj esperantistoj en Varna.

Intertempe la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio komisiis al s-ano Kiril Drajev helpi la novefonditan trupon kiel organizanto, lingva konsultanto kaj tradukanto. En la aŭtuno de 1958 la E-kurso en teatro „Trudov Front“ denove ekfunkciis, nun jam sub la gvidado de K. Drajev. Li tradukis en Esperanton la ŝatatan komedion de Ivan Vazov „Ĉasantoj de oficoj“ kaj la artistoj entuziasme komencis provludojn sub la gvidado de St. Prohaskova. La komedio estis prezentita kun sufiĉe bona sukceso enkadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio 1959. Tio estas la unua prezentiĝo de BET antaŭ internacia E-publiko.

Post la kongreso de BEA en Veliko Târnovo (1960) la trupo preparis — jam kun pli granda sperto, la Sekspirverkon „Komedio el eraĵoj“. La saman komedion la trupo prezentis dufoje sur la scenejo de la Nacia Operteatro enkadre de la Universala Kongreso de Esperanto en Sofio (1963) antaŭ pli ol 3000 spektantoj.

En la kulturprogramo de la Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto (1966) BET prezentis kvar unuaktajn komediojn: „Urso“ de A. P. Ĉeĥov, „Du ŝtelistoj“ de Branislav Nuŝiĉ, „Familiaj problemoj“ de M. Talvest kaj la dramigon „Dio absolvu“ laŭ rakonto de Elin Pelin.

Por la kongresoj de la Internacia Federacio de Esperantistoj-Fervojistoj (IFEF) kaj la regula kongreso de BEA en Varna (1968) BET prezentis kun tre bona sukceso la komedion „Akridoj“ de St. L. Kostov. Inter la geaktoroj (Beleva, Nedeva, G. Mladenov, Anani Anev, M. Cobanov, M. Zdravev k.a.) estis ankaŭ la popola aktorino Margarita Duparionova.

Dum tiuj jaroj la geedza aktora paro Belka Beleva kaj Anani Anev montris imitindan aktivecon kaj prezentis kelkajn komediojn diversloke — enlande kaj eksterlande: „Propono pri geedziĝo“ de A. P. Ĉeĥov, „Don Perlemtino“ de Federiko Garcia Lorca, la jam prezentitan „Familiaj problemoj“ de M. Talvest, „Divorco“ de N. Slonova ka.

Ekde 1969 la gvidanto de BET K. Drajev decidis vastigi ĝian konsiston. Rezulte en diversaj spektakloj de BET, prezentitaj dum la sekvaj jaroj enkadre de Universalaj Kongresoj de Esperanto, rolis la popolaj aktorinoj Olga Kirĉeva, Margarita Duparinova, Lili Popivanova, Tanja Masalitina, la meritaj aktoroj Petăr Vasilev, Nikolaj Binev, Vanĉa Dojĉeva, Violeta Nikolova, Sofka Atanasova, Konstantin Kocov, kaj ankaŭ la geaktoroj Iskra Radeva, Adriana Andreeva, Jorĵeta Ĉakárova,

Todor Jurukov, Kosta Conev, Petâr Vučkov, Stefan Stajčev, Anani Javašev ka. Tiu ĉi vastigita konsisto prezentis en la kadro de diversaj Universalaj Kongresoj de Esperanto la teatraĵojn: „Virina Regno“ de St. L. Kostov (Vieno 1970), „Mandragora“ de Machiavelli (Londono 1971), „La razisto de Sevilla“ de Beaumarchais (Hamburgo 1974), „Servisto de du mastroj“ de Carlo Goldoni (Kopenhago 1975), „Lernejo por virinoj“ de Molière (Aterno 1976), „Megero“ de A. Strašimirov (Varna 1978). Aparte granda estis la sukceso de „Mandragora“. Pri tiu ĉi spektaklo la belga ĵurnalisto kaj teatra kritikisto P. de Smet skribis en „Heroldo de Esperanto“: „La publiko unuanime opinias tiun spektaklon la plej bona, kiu iam estis prezentita en UK“. Pri la prezento de „Servisto de du mastroj“ tre altan pritakson donis prof. d-ro H. Tonkin, la tiama prezidanto de UEA. Interalie li skribis: „La Bulgara E-Teatro estas fiero ne nur por ni, parolantoj de Esperanto, tiel bone kaj klare prononcata de la artistoj, sed fiero ankaŭ por ĉiuj bulgaroj... Per sia agado BET bonege prezentis la bulgaran teatran arton antaŭ internacia publiko“.

Dum tiuj jaroj la duopo Beleva kaj Anev prezentis: „Kara mensogulo“ de Cilty (Londono 1971), „Familia matĉo“ de Al. Girginov (Beogrado 1973), „La ruĝaj rozoj“ de A. de Benedetti (enkadre de la kongreso de IFEF en Taragona, Hispanio — 1974), „Amo“ de Paul Jerald (Lucerno 1979).

Por ke oni havu pli ĝustan kaj plenan imagon pri tio, kion BET donis kaj donas al la bulgara E-movado, ni devas substreki la grandan pretecon, kun kiu kelkaj el la aktoroj respondis kaj respondas al ĝiaj konstantaj kaj ĉiam pli kreskantaj bezonoj. Unualoke tio estas la aktoroj B. Beleva, A. Anev, M. Ĉobanov, M. Zdravev, kiuj fariĝis veraj aktivuloj de la bulgara E-movado. Per sia arto ili pliriĉigas kaj variigas ĝian vivon, helpas ĝian propagandan kaj idean-edukan laboron, kontribuas por plialtigo de la lingva kaj estetika nivelo de la bulgaraj esperantistoj, subtenas la elkreskon de junaj aktoroj, recitantoj ktp.

Ili estas ĉie: partoprenas en la belartaj programoj de E-kongresoj, festaj kunvenoj, solenaĵoj kaj jubileaj celebroy, en la ĵurioj de la ĉiujaraj naciaj revuoj de E-Parolo kaj Kanto, de diversaj recitaloj kaj konkursoj ktp. Tio estas laboro ege grava, valora kaj necesa por la bulgara E-movado.

Por ankoraŭ plialtigi la nivelon de la spektakloj, ni opinias, ke la CE de BEA devas prizorgi la kreon de relative konstanta konsisto de BET, kiu ĉiam povos kontentigi la bezonon pri ĉefroluloj en diversaj ludotaj teatraĵoj. Estas necese, ke ĉiuj aktoroj bone ekposedu la Internacian Lingvon por senti sin libere sur la scenejo. Estas necese ankaŭ organizi kolek-



Sceno el la komedio „Mandragora“ de Nicolo Machiavelli, prezentita de la Bulgara E-Teatro antaŭ partoprenantoj en la 36-a UK, Londono, 1971.

tivan gvidorganon de la teatro, kiu zorgos pri repertuaro, aktoroj ktp.

Dum sia kvaronjarcenta ekzistado BET gajnis la amon kaj estimon de la bulgaraj esperantistoj kaj de la internacia E-publiko. Ĝi estas senduba kreanto de kulturaj kaj estetikaj valoroj, pozitiva faktoro en la proceso de internaciigo de la kulturo kaj arto. Samtempe pere de ĝi Bulgario prezentas al la mondo siajn naciajn kulturon kaj arton de juna, inspirita kaj supreniranta lando — batalanto por amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj, por paco kaj feliĉo sur la Tero.

Kunĉo VÁLEV

ESPERANTISTA GEEDZIGO



La 30-an de januaro 1983 en Ruse edziniĝis nia juna E-aktivulino Binka Ŝiskova kun Grigor Kănčev. Ni bondeziras al la nova geedza paro feliĉan kunvivadon, ĝojon kaj sukcesojn!

AKADEMIANO VLADIMIR GEORGIEV

(OKAZE DE LIA 75-JARIGO)



Ci-jare la bulgara kultura publiko celebras la 75-jariĝon de la plej elstara reprezentanto de nia lingvoscienco — akademiano **VLADIMIR IVANOV GEORGIEV**.

Naskita en 1908 en vilaĝo Gabare, distrikto de Vraca, en familio de popolaj instruistoj, post la fino de gimnazio en Varna (klasika fako), li studis klasikan filologion en la Sofia Universitato, kiun finis en 1930. Pro lia eksterordinara talento ĉe ekposedo de la scienco, en 1931 li estis oficigita kiel asistanto en la Katedro de Klasika Filologio ĉe la Sofia Universitato. Jam la sekvan jaron li publikigas sian unuan gravan verkon pri temo el la sfero de la hindo-eŭropa lingvoscienco. En 1936 li atingas la sciencon gradon docento ĉe la sama katedro kaj en 1945 estas elektita kiel eksterordinara profesoro. Ekde 1948 li jam estas regula profesoro kaj gvidanto de Katedro pri Generala kaj Kompara Lingvoscienco ĉe la Sofia Universitato. En 1948 estas elektita membro-korespondanto de Bulgara Akademio de Sciencoj, kaj de 1952 li estas akademiano.

Dum sia tuta konscia vivo akademiano Georgiev obstine laboras sur komplikaj problemoj en diversaj sferoj de la lingvoscienco. Li sukcesis malkovri nekonatan ĝis la 40-aj jaroj de la XX jarcento hindo-eŭropan lingvon — la „antaŭgrekan“ („pelasgan“). En mallonga tempo tiu ĉi tezo gajnis entuziasmajn adeptojn en eksterlando kaj tiel naskiĝis nova skolo en

la hindo-eŭropa lingvoscienco, nomita laŭ lia nomo — „Georgieva“. Samtempe akademiano Georgiev okupiĝas pri la enigma etruska lingvo kaj argumentas novan tezon: ke ankaŭ ĝi estas hindo-eŭropa lingvo, evoluinta sur la bazo de la malaperinta „hetita“ lingvo, parolita dum II jarmilo antaŭ nia erao en Malgranda Azio. Grava estas la kontribuo de akademiano Georgiev al elkriptigo kaj interpreto de Kreto-micenaj surskriboj, kiuj ĝis la 50-aj jaroj ĉiam ankoraŭ estis enigmo por la scienco.

Alia grava sfero de la sciencaj intereso de akademiano Georgiev estas la traca lingvo. Surbaze de sperta lingva analizo li faris alian gravan sciencon eltrovon: sur la vasta teritorio de la Karpatoj ĝis Blanka Maro en la antikveco estis parolataj du lingvoj: la dacomizia kaj la traca.

Konsiderinda estas la kontribuo de akademiano Georgiev en la esploro de problemoj de la slava kaj bulgara lingvoscienco, samkiel de la balkanaj lingvoj. Depost 1960 li estas prezidanto de la Bulgara Nacia Komitato de Slavistoj kaj de la Bulgara Nacia Komitato pri Balkanistiko. En siaj multnombraj sciencaj verkoj li arde kaj argumentite defendas la sciencon veron pri teritoria unueco de la bulgara lingvo, disvastigita en tri geografiaj regionoj: Mizio, Trakio kaj Makedonio.

La tre ampleksa scienca faro de akademiano Georgiev (pli ol 800 artikoloj, studverkoj kaj libroj) merite ĝuas internacian rekonon. Akademiano Georgiev estas elektita kiel honora doktoro (doctor honoris causa) de la Berlina Universitato „Aleksander kaj Wilhelm von Humboldt“ (GDR), de la Karla Universitato en Prago; li estas membro-korespondanto de Finna, Belga, Saksa kaj Atena Akademioj de Sciencoj, dufoje laŭreato de Dimitrov-premio, popola aganto de la scienco, heroo de socialisma laboro, kavaliro de ordeno „Georgi Dimitrov“.

Akademiano Georgiev havis pozitivan scienca argumentitan pozicion pri Esperanto. En siaj sciencaj kaj pedagogiaj verkoj li ĉiam esprimis pozitivan rilaton al la Internacia Lingvo. Dum pluraj jaroj li estis membro de la redakta komitato de la konata revuo „La Monda Lingva Problemo“. Kun lia permeso, kiel ĉefredaktoro de Enciklopedio „Bulgario“, aperis

en la unua kaj dua volumoj sufiĉe detalaj artikoloj pri la bulgara E-movado kaj pri Bulgara Esperantista Asocio, kio tre senpere helpas la propagandon de Esperanto inter la bulgara intelektularo. En la Tria Internacia Lingvistika Konferenco en Parizo li argumentite defendis la pozicion de Esperanto kaj la plimulto el la delegitoj subtenis lian opinion. Li subskribis ankaŭ la proponon de la Nobel-komitato en Stokholmo pri distingo de UEA per la Nobel-premio. Pro reakciaj konceptoj

de la ĵurio de la Nobel-komitato, UEA ne ricevis la Nobel-premion pri Paco — oni aljuĝis ĝin al la militinstiganto Winston Churchill. Tamen tio ne malgravigas la noblan subtenon al UEA fare de akademiano Georgiev¹.

Prof. Ivan DURIDANOV,
membro-korespondanto de
Bulgara Akademio de Sciencoj

¹ La informon pri la rilato de akad. V. Georgiev al Esperanto atable disponigis Nikola Aleksiev — Noto de la Red.

ESPERANTAJ BIBLIOTEKOJ

La unua Esperanta libro estas eldonita en 1887 kaj markas la komencon de fekunda literatura produktado. Post 95-jara ekzistado — relative mallonga periodo por kiu ajn lingvo, la publikigitaj en Esperanto verkoj jam estas miloj!

En mallonga tempo apartaj personoj kaj institucioj establis proprajn kolektojn, tamen oni devis atendi kelkajn jardekojn por vidi fondita internacian bibliotekon. Jam en 1927 Feliks Zamenhof, frato de la kreinto de la Internacia Lingvo, proponis al la partoprenantoj en la XI Universala Kongreso de Esperanto en Gdansk, Pollando, la fondon de Internacia Esperanto-Biblioteko. La sekvan jaron, dank' al la apogo de la aŭstra kanceliero Seipel, la kolektitaj dokumentoj kaj libroj estis transdonitaj al la muzeo en Vieno, kie, depost 1945, la Internacia Esperanto-Muzeo, prezentanta parton de la Nacia Biblioteko, per ministra decido, jam disponis pri kvin grandaj haloj en la malnova imperiestra kastelo (Bathyanystiege, Hofburg). Laŭ la plej novaj statistikaj donitaĵoj, disponigitaj de ĝia direktoro (de la 5-a de majo 1982), la muzea biblioteko posedas 18 124 librojn kaj plenajn jarkolektojn de ĵurnaloj, gazetoj kaj aliaj E-periodaĵoj, krom granda nombro da diversaj objektoj kaj eksponaĵoj (fotoj, afiŝoj, faldfolioj ka.).

En 1973 la publika biblioteko en Courtrai oficiale malfermis specialan E-sekcion dank' al la Fondaĵo César Vanbiervliet, nomita omaĝe al tiu, kiu estis la iniciatinto kaj plu estas la plej arda aganto. Specialiginte pri kolektado de periodaĵoj, ĝi estas konsistigita el donacoj kaj heredaĵoj kaj pliriĉigas dank' al la sindona aktivado de s-ro M. C. Vanbiervliet, kiu strebas kolekti ĉiujn novajn eldonojn, kompletigi la kolektojn surbaze de reciproka interŝanĝo aŭ pere de fotokopioj. Jam plurfoje la biblioteko en Courtrai disponigis siajn riĉajn kolektojn al gestudentoj por prepari studverkojn pri Esperanto.

Nun la tuta kolekto nombras pli ol 1530

titolojn, aperintajn post 1889, kaj 7517 jarkolektojn, el kiuj 4278 plenajn. Krom tiuj periodaĵoj la biblioteko posedas pli ol 5000 librojn kaj aliajn dokumentojn, kiuj povas esti pristuditaj surloke aŭ provizore disponigitaj al alia publika biblioteko. Tiuj ĉi ciferoj datigas de la 22-a de septembro 1982.

Inter la plej imponaj Esperantaj bibliotekoj oni povas menci tiun en Roterdamo, apartenantan al la Universala Esperanto-Asocio (kun pli ol 10 000 volumoj), kaj ankaŭ tiun en la Esperanto-Centro en Chaux-de-Fonds en Svislando (unu el la plej riĉaj je verkoj pri la problemoj de interlingvistiko), ne forgesante tiun en Londono, apartenantan al Brita Esperanto-Asocio (ĝi posedas pli ol 11 000 librojn, 1200 jarkolektojn de periodaĵoj kaj proksimume 25 000 diversajn dokumentojn).

Tamen ekzistas grandaj malfacilaĵoj por la favora evoluo de tiu nobla agado, precipe manko de spertaj kunlaborantoj, pretaj sin okupi pri la konservado de tiuj ege valoraj kolektoj, akiritaj kun tiom da pacienco, persisto kaj amo. Lastatempe la respondeculoj pri Bulgara Esperanto-Muzeo sciigis, ke en Bulgario ekzistas kelkaj konsiderinde grandaj publikaj kaj privataj E-bibliotekoj kaj kolektoj, sed estas vere malfacile doni la ĝustajn ciferojn, denove pro la sama kaŭzo — manko de spertuloj en tiu sfero de E-agado. Preskaŭ sama estas la situacio en Ĉeĥoslovakio, kie laŭ la plej novaj informoj biblioteko Jaroslav Sustar ĉe la E-klubo en Prago posedas „85 metrojn da bretoj por proksimume 6100 libroj, revuoj, broŝuroj kaj aliaj periodaĵoj“!...

Cetere, dum la lasta kvarono de nia jarcento nur tri Esperantaj bibliotekoj prezentis ĝustajn ciferojn pri la nombro de siaj kolektoj kaj eldonis katalogojn, kiuj grave faciligas esplorojn kaj studojn. Tio estas la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, 1957, Katolika Universitato en Lublin (Pollando), 1981, kaj la Publika Biblioteko en Courtrai, 1981.

Nin atendas longa, obstina kaj temporaba laboro en tiu direkto, se ni dezirus, ke oni profitu plej racie tiujn literaturajn trezorojn.

Germain PIRLOT
(el „La Dernière Heure“, 11. 11. 1982, Bruselo)



KREINTOJ DE L' BULGARA SKRIBO

„Kaj tiel, unue la slavoĵoj ne havis librojn, sed per streketoj skribis kaj aŭguris, estante ankoraŭ paganoj. Kiam ili kristaniĝis, ili estis devigitaj skribi la slavan parolon per romiaj kaj grekaj literoj, laŭeble.

Post tio la homama dio, kiu ĉion konstruas kaj ne lasas la homan genton sen racio, sed ĉiujn homojn alkondukas al racio kaj savo, kompatis la slavan genton kaj sendis al ĝi Sanktan Konstantinon la Filozofon, nomatan Cirilo — viron senpekan, kiu kreis por ili tridek ok literojn, iujn laŭ modelo de la greka alfabeto, kaj aliajn — konforme al la slava parolo.

Se tamen oni demandus la grekajn literaturistojn, dirante: „Kiu kreis viajn literojn aŭ kiu tradukis viajn librojn, aŭ kiam tio okazis?“ — malmultaj el ili scias. Se tamen oni demandus la slavajn literaturistojn, dirante: „Kiu kompilis vian alfabeton, aŭ kiu tradukis la librojn?“ — ĉiuj scias kaj respondos al vi: „Sankta Konstantino la Filozofo, nomita Cirilo; li kreis la literojn kaj tradukis la librojn, kaj ankaŭ Metodio, lia frato“, ĉar ankoraŭ estas vivantaj homoj, kiuj vidis ilin. Kaj se oni demandus, kiam tio okazis — ili scias kaj diros, ke tio okazis en la tempo de la bizanca caro Miĥail kaj de la bulgara princo Boris, en la jaro 6363 (863) post la kreo de la mondo“.

(Ĉernorizec Ĥrabâr, „Pri la literoj“, IX—X jc., fragmento)

HIMNO DE CIRILO KAJ METODIO

Tempo de marŝo

Panaĵot Pipkov (1871—1942)

An- taŭ- en al es- ton- to he- la nun
i- ru, i- ru, ho na- ci', per la kul- tu- ro- for- to
no- va — a- ki- ru sor- ton no- van vi. Vi
en ba- ta- loj es- tis bra- va, jam glo- ras vin la hi- sto-
ri'. Nun svin- gu kun la gen- toj sla- vaj la
faj- ran gla- von de l' spi- rit'! Nun rit'!

Sofiaj instruistoj lernas Esperanton

Por prepari pli grandan nombron da instruistoj de Esperanto por mezlernejoj, la Sofia Urba Estraro de BEA organizis en la komenco de la kuranta jaro kvarmonatan kurson por instruistoj el Sofio, vaste reklamitan per la gazetaro kaj radio.

La 15-an de februaro en unu el la aŭditorioj de la Fakultato pri Ĵurnalistiko la kursgvidanto Marin Băcev bonvenigis pli ol 60 gekursanojn-instruistojn el sofiaj mezlernejoj, venintajn kun la firma decido ellerni Esperanton kaj poste mem instrui ĝin en siaj lernejoj.

Sperta lektoro, longjara instruisto de germana lingvo, la nuna ĉefmetodisto de BEA Marin Băcev lerte gvidas la kurson. Ofte li proponas al la gekursanoj la eblecon, ke ili mem eliru la gramatikajn regulojn, des pli ke multaj el ili estas instruistoj de fremdaj lingvoj. Rezulte ilia intereso al Esperanto kreskas kaj ili aktive partoprenas la instruadon.

La Estraro de BEA, kaj pli speciale de la Instruista Sekcio ĉe BEA, montras intereson kaj zorgemon al tiu kurso, al la estontaj E-instruistoj. Ekde la komenco mem reprezentantoj de la Instruista Sekcio vizitis la gekursanojn kaj invitis ilin partopreni kunvenon de la sekcio, promesante al ili akiron de riĉaj kaj variaj informoj.

Kunlaboranto de la redakcio de „BE“ ankaŭ vizitis la kurson kaj starigis al iuj el la gekursanoj kelkajn demandojn:

1. Kiel vi eksciis pri tiu kurso kaj kial vi decidis partopreni en ĝi?

2. Ĉu vi sukcesas asimili la instruatan materialon, inkluditan en ĉiu aparta leciono?

3. Ĉu vi plezure lernas Esperanton?

4. Ĉu vi intencas fini la kursojn de pli alta grado kaj fariĝi instruisto de Esperanto?

Kaj jen estas la respondoj al tiu ĉi improvizita enketo:

Ivan Sirakov — instruisto de matematiko en 61-a elementa lernejo, 25-jara:

— Pri la kurso mi eksciis de ĵurnalo „Veĉerni Novini“ kaj decidis aliĝi. Ĝis nun mi ne havis intereson pri Esperanto. Mi plezure ĉe-

tas la lecionojn, la lernado ne malfaciligas min — des pli ke mi iom lernis francan kaj anglan lingvojn. Mia opinio, la lecionoj inkludas facile asimileblan kvanton da studmaterialo. Mi intencas akiri instrurajton pri Esperanto.

Elena Bojdeva — instruistino de rusa lingvo en 133-a Meza Politeknika Lernejo, 23-jara:

— Mi aŭskultis la radioreklamon pri E-kurso por instruistoj kaj mi estas ege kontenta pri mia decido ĝin partopreni. Por mi la lernado estas relative facila kaj al mi tre plaĉas la instrumaniero de nia lektoro kaj kolego M. Băcev. Mi faros ĉion eblan por akiri instrurajton, ĉar mi deziras instrui Esperanton.

Rumjana Aldeva — instruistino de agrarekonomio, 35-jara:

— Ankaŭ mi eksciis per la radioelsendo pri la kurso kaj ege ekĝojis. Mi estas edzino de diplomato kaj jam delonge mi serĉas rimedon por faciligi la kontaktojn kun alilandanoj. Vere, mi iom scipovas paroli francan lingvon, sed mi esperas, ke Esperanto ebligas al mi starigi kontaktojn kun geesperantistoj el la landoj, en kiuj loĝas nia familio. Tiamaniere mi neniiĝos la lingvajn barojn kaj akiros multajn novajn geamikojn. Kaj kiam ni definitive revenos Bulgarijon, mi finstudos Esperanton kaj instruos ĝin.

Slavka Bogoeva — instruistino de teksado en Interlerneja Centro, 28-jara:

— Mi havas kolegon, kiu estas arda esperantisto kaj de li mi eksciis multon pri Esperanto. Tamen ĝis nun mi eĉ ne sciis kiel ĝi sonas. Kiam mi informiĝis per la radio pri organizo de instruistaj kursoj, mi senhezite decidis utiligi tiun ĉi eblecon. La lecionoj kontentigas min kaj mi plezure lernas la instruatan materialon. Nun mi ne povas kategorie diri ĉu mi finos ĉiujn studgradojn, tamen estas ankoraŭ sufiĉe da tempo por decidi pri tio.

Post similaj favoraj eldiroj ni deziras al ĉiuj gekursanoj, ke ili sukcese finu la unuagradan kurson kaj multaj el ili estiĝu spertaj instruistoj de Esperanto.

Lada MILKOVA

Stojan MIĤAJLOVSKI

HIMNO DE ĈIRILO KAJ METODIO

Antaŭen! Lumas la scienco
en la animo de l'naci'.
Ĝi sentas viglon kaj potencon,
ĉar saĝa iĝis la konsci'.

Per tiaj vortoj ambaŭ fratoj
inspiris min dum juna aĝ'.
Ho temp' iama memorata
ho sankta, glora heredaj'.

Kreintoj de l'bulgara scio,
de nia kara alfabet',
ho vi, Ĉirilo, Metodio,
ni dankas vin pro la hered'!

Vivadu viaj nom' kaj faro
en la popolo dum estont'!
Parolo slava, kiel maro
sin verŝu ĉiam tra la mond'!

El la bulgara: Stefan KIRAĜIEV

RADIKO KAJ VORTO EN ESPERANTO

Zamenhof ne kreis vortojn. Li kreis „materialon“ kaj „teknologion“ por produktado de vortoj. La kreita de li „materialo“ konsistas, ĉefe, el radikoj kaj el finaĵoj „o“, „a“, „i“ kaj „e“. La vorto estas produktata per algluo de iu el la menciitaj finaĵoj al iu radikoj. Antaŭ la algluo de la finaĵo vorto ne ekzistas. La vorto naskiĝas nur post la algluo de la finaĵo.

La gramatikaj kategorioj — substantivo, adjektivo, verbo kaj adverbo — portataj de la finaĵoj aperas nur post kiam la finaĵoj algluiĝas al la radikoj, t. e. nur post kiam naskiĝas la vortoj. La algluo de la finaĵoj al la radikoj ne nur naskas la vortojn, sed naskas ankaŭ la gramatikajn kategoriojn, tiel kiel la industria produktado naskas ne nur produkton, sed ankaŭ specon de produkto. Do, la radikoj ne povas esti substantivoj, adjektivoj, verboj aŭ adverboj. Alivorte dirite, ne povas ekzisti substantivaj, adjektivaj, verbaj aŭ adverbiaj radikoj, pro la klara fakto, ke antaŭ la algluo de la finaĵo oni ne scias kio naskiĝos. La gramatikan kategorion donas la finaĵo.

La ĉi-supra analizo malkovras unu el la plej karakterizaj trajtoj de Esperanto, trajto, kiu radikale distingas Esperanton disde la etnaj lingvoj, ĉe kiuj la primareco apartenas al la vortoj, ĉar la homoj komencas etne paroli per vortoj, dum la radikoj estas io sekundara, ĉar estas eltirata el la jam ekzistantaj vortoj. Ĉe Esperanto estas inverse.

La koncepto, ke la Esperanto-leksiko konsistas, fakte, ne el vortoj, sed el radikoj, ne povas ne estiĝi la demando, pro kio ni kunmetas vortarojn, sed ne radikarojn.

Se temas pri etno-Esperanta aŭ inversa transiĝo, la respondo estas tutfacila. La etno-Esperanta aŭ inversa transiĝo pro la jam menciita eco de la etnaj lingvoj ne povas esti realigita alimaniere ol per helpo de vortoj, respektive vortaroj.

Se temas pri Esperanto-Esperanta vortaro, ĝi, fakte, estas ne vortaro, sed radikaro, ĉar

ĝi liveras radikojn, ilustritajn per vortoj, en kiuj la respektiva radikoj plej ofte realiĝas. Ekzemple, kiam temas pri radikoj **met**, ĝi estas prezentata per la vorto **meti**, ĉar la plej ofta realiĝo de tiu ĉi radikoj estas per tiu ĉi vorto. Kiam temas pri radikoj **ĉambr**, ĝi estas prezentata per la vorto **ĉambro**, ĉar la plej ofta realiĝo de tiu ĉi radikoj estas per tiu ĉi vorto. Do, en la menciitaj ekzemploj ne temas pri ia potenciala verbeco aŭ substantiveco de la radikoj, pri ia emo de la radikoj al tiu aŭ alia gramatika kategorio, sed nur pri ilustro de la radikoj per tiu aŭ alia vorto.

La konscio, ke la Esperanto-leksiko konsistas ne el vortoj, sed el, ĉefe, radikoj, havas gravan praktikan, antaŭ ĉio psikologian signifon.

Ĝi memfidigas la parolanton, pliintimigas lin kun la lingvo. La parolanto sin sentas konstruanto de la vortoj tiel, kiel li estas konstruanto de la frazoj. Antaŭ li ekzistas nur radikoj, finaĵoj kaj reguloj. Li rigardas la parolatajn de li vortojn kiel konstruitajn de li mem, ne kiel altruditajn al li el ekstere. Tio ne senaŭtoritatigas la elstarulojn en la lingvo. Al ili la parolanto rilatas kiel al konsultantoj, ne kiel al leĝdonantoj. En la sfero de konstruado de la vortoj leĝdonantoj ne ekzistas. Tia ne estas eĉ Zamenhof. Oni devas distingi Zamenhof-kreinton de la lingvo disde Zamenhof-parolanto de la lingvo. Eĉ la konstruitajn de Zamenhof-parolanto vortojn oni povas kaj devas kontroli per la kreitaj de Zamenhof-kreinto reguloj.

La aserto, ke Zamenhof ne kreis vortojn, devas esti precizigita. Zamenhof kreis ankaŭ vortojn. Li kreis, ekzemple, la tiel nomitajn primitivajn adverbojn. Sed ne ili donas la karakterizon de la Esperanto-leksiko. Ili estas, tiel diri, flankaj elementoj. Fakte, eĉ ili konfirmas la radikecan karakteron de la Esperanto-leksiko. Ĉiuj primitivaj adverboj estas samtempe radikoj. Io pli. Ili, malgraŭ ke estas adverboj, povas, kiel radikoj, formi ne nur substanti-

vojn, adjektivojn kaj verbojn, sed ankaŭ adverbojn. Konata estas la uzo de **plie**, **plue**, **juse** ktp. La radikeca karaktero de la Esperanta leksiko estas tiel dominanta, ke subigas ankaŭ la prepoziciojn kaj eĉ la afiksojn. Konata fakto estas, ke ĉiuj prepozicioj kaj afiksoj estas samtempe radikoj. Malmultaj el la pronomoj kaj el la konjunkcioj sukcesas eviti la radikecan karakteron de la Esperanto-leksiko.

Konklude oni devas aldoni, ke la gramatika neŭtraleco de la radiko ne estas bone konscia-

ta. La prezento de la radikoj en la vortaroj per ekzemploj de gramatikaj kategorioj kondukas al nekonsciata substantivigo, adjektivigo, verbigo kaj adverbigo de la radikoj. Al la konscio, al kutimiĝinta al tia rilato, poste estas strange vidi la saman radikon en alia gramatika kostumo. Tiu ĉi cirkonstanco estas unu el la gravaj malhelpoj por plene ekspluati la potencialan riĉaĵon de la Esperanto-leksiko.

Ljubomir MIHAJLOV

E-lektoro dividas sperton

La plej grava tasko de ĉiu kursgvidanto estas reteni la gekursanojn de la unua lernohoro ĝis la ekzamentago. La ideala kondiĉo por tio estas, ke la gekursanoj estu en sama aĝo kaj klereco. Tre ofte tamen formiĝas kursoj el tute malsamaj personoj. Tio validas aparte pri la urbaj civitanaj kursoj. Kvankam estas tro malfacile labori en tia medio, mi ĉiam strebas krei favoran etoson.

Ekde la unua leciono mi penas kompreni kiel eble plej baldaŭ la menskapablojn de ĉiu kursano. Al tiuj, kiuj postrestas, mi tre atente rilatas — mi demandas, trankvile atendas respondon kaj ofte helpas respondi korekte. Mi estas pli postulema al tiuj, kiuj estas pli kapablaj. Se la respondo ne estas ĝusta, mi demandas la ceterajn ĉu la respondinto eraris aŭ ne. Tiamaniere la tuta kurso pensas por doni korektan respondon. Tio ankaŭ helpas al la postrestintoj kaj ofte ili donas kontentigan respondon. Tiujn spertojn mi akiris en la unuaj kursoj, kiujn antaŭ 20 jaroj mi komencis gvidi en uzino „Vorošilov“ — Sofio. En ili partoprenis krom laboristoj ankaŭ homoj kun alta grada klereco.

Gravan rolon ludas hejmaj ekzercoj. Mi ĉiam postulas, ke la gekursanoj faru hejmajn ekzercojn, kiujn mi atente kontrolas kaj komence de la sekva leciono mi skribas sur la nigra tabulo la erare skribitajn vortojn kaj frazojn. Helpe de la kurso mi korektas la faritajn erarojn.

Mi uzas diversajn vidajn helpilojn en la lecionoj. Ĉiam mi kunportas artefaritajn bestojn, birdojn, pupojn aŭ bildojn. Montrante korpartojn de bestoj, mi demandas pri iliaj nomoj en Esperanto. Aŭ depende de la leciono mi montras iun bildon kaj petas la gekur-

sanojn rakonti kio estas videbla. Tiamaniere pli facile kaj pli frue la komencantoj ekparolas esperante.

Se mi rimarkas, ke iu multe postrestas, mi petas lin aŭ ŝin resti post la leciono por komprenigi la neklarajn demandojn kaj gramatikajn erojn.

Antaŭ kelkaj jaroj mi gvidis unikan E-kurson. En ĝi partoprenis infanetoj de 9- ĝis 13-jaraj kaj plenaĝuloj ĝis 63-jaraj. Malgraŭ la granda aĝdiferenco, mi sukcese plenumis la antaŭviditan programon. La infanoj vigle partoprenis la voĉlegadon de lecionoj kaj la respondojn al demandoj. Fine de la kurso 63-jara pensiulo, kiu en la komenco prononcadis **Eksperanto**, tralegis senerare unupaĝan adiaŭan tekston.

Gvidi kurson en lernejo estas ege malfacila okupo. Nuntempe mi gvidas du kursojn por komencantaj lernantoj. La infanoj estas el VI kaj VII klasoj. Vere estas bedaŭrinde, ke ili estas tro ŝarĝitaj per plej diversaj eksterlernejaj okupoj. Pro tio ĉiam iuj forestas.


Antaŭ pli ol 10 jaroj mi estris E-kurson el samaĝaj lernejoj. Ĝi okazis ne en lerneja ĉambro, sed en kvartala klubejo ekde la sesa horo vespere. La infanoj helpe de du patroj organizis tiun kurson kaj estis plezuro por mi gvidi ĝin. Ili regule vizitadis la kurson, neniu forestis kaj ĉiam estis deĵoranto. Ĝi finiĝis sukcesplene. Do ŝajnas al mi, ke la arango en la klubejo estas diferenca kaj pli alloga por la infanoj ol la lernejoj ĉambroj. Tiel ili ne sentas la E-kurson kiel lernobjekton, sed kiel ion pli gravan.

Se ĉi-jare mi ne sukcesos transloki la nunajn E-kursojn en iun kvartalan klubejon, mi faros ĝin venontjare.

Ljuben GROZDANOV

Sukcesa turneo de Veselin Damjanov

Laŭ invito de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) en januaro la bulgara baritono Veselin Damjanov havis koncertojn en Hispanio. Ili estis organizitaj de HEF kunlabore kun la muzikaj asocioj „Orfeo Graciens“, „Amikoj de la muziko“ kaj urbaj kulturaj instancoj.



Veselin Damjanov dum koncerto en Valladolid, Hispanio (ĉe la piano Judit Pardo).

La unua koncerto okazis en la salono de la Madrida Esperanto-Liceo, kie Damjanov kantis, akompanante sin per akordiono. La 17-an de januaro li kantis en la salono de la Urbo-domo de Valladolid, kie lin akompanis la juna pianistino Judit Pardo. La sama pianistino akompanis Damjanov dum lia koncerto, okazinta la 22-an de januaro en la Konservatorio de Zaragoza.

En Katalunio kun granda sukceso li kantis en Barcelono, Sabadell kaj Villanova y Geltru. En ĉiuj tri koncertoj akompanis lin Maria Canela.

En ĉiu urbo oni eldonis belan programon en hispana aŭ kataluna lingvoj, kun biografio de

la artisto. Veselin Damjanov plenumis muzik-verkojn de Mozart, Gounod, Kalman, Strauss, Lehar, Ĉerkin, Lara k.a. La hispana gazetaro aperigis flatajn artikolojn pri la kantarto de nia artisto. La ĵurnalo „El norte de Castilla“ sub titolo „Veselin Damjanov, granda baritono, prezentita de la E-grupo de Valladolid“ skribis:

„Li posedas bonegan voĉon: potenca, kun bela tembro kaj riĉaj nuancoj. Kvankam la koncerto estis enhave varia: operoj, italaj kanzonetoj, operetoj, bulgaraj kaj rusaj kantoj, francaj kaj hispanaj kanzonoj — ĝi estis akceptita kun granda intereso, ĉar ĉie per voĉa plenumo, gesto kaj mimiko brilis granda kaj eksterordinara artisto. Damjanov kantis en pluraj lingvoj kaj en Esperanto. Tio eble ŝokis la publikon, sed oni ne devas forgesi, ke Damjanov estas esperantisto.

Lia konciza parolo en la Internacia Lingvo post la unua parto de la recitalo sendube celis konvinki la ĉeestantojn (plejparte neesperantistoj), ke Esperanto estas vivanta kaj belsona lingvo samkiel la hispana kaj itala. La publiko fakte eksentis tion, ĉar post la fino Damjanov devis bise plenumi kelkajn kantojn. Tiu tre agrabla recitalo per sia populareco kontentigis la gustojn de muzikŝatantoj de diversaj ĝenroj.“

Jen ankoraŭ unu recenzo pri nia ŝatata artisto, ĉi-foje el Sabadell:

„Per sia altnivela brila artisma mimiko, profunda lirikismo kaj vera traktado de l'teksto Damjanov kaptas ĉiam la atenton de l'aŭskultantaro. Kiel potenca agrabla baritono li facile adaptas sin al diversaj muzikaj ĝenroj.“

Parton de la recitaloj elsendis la radio kaj televido. Krom tio ok radiostacioj dum pli ol duonhoru intervjuis Veselin Damjanov, disaŭdigante ankaŭ liajn diskojn. En la intervjuoj per demandoj partoprenis ankaŭ aŭskultantoj telefone. Damjanov funde respondis al la demandoj.

Veneta BALEVA

POETO-SORĈISTO

Estante nur dudek du jara Pejo Javorov jam estas poeto-sorĉisto — li majstre posedas la versfaradon, samkiel granda violonisto — la arĉon.

Javorov estas ne nur inspirita poeto — legante liajn versojn oni ne scias pri kio pli multe miri — ĉu pri ilia sonriĉeco aŭ pri la majestaj bildoj, kiujn la poeto kreas per sia imagopovo.

En la periodo 1892—1898 Javorov estis proksima al la socialisma movado en Bulgario. En siaj verkoj de tiu periodo li prezentas la socian tragedion de la bulgara kamparano, sian proteston kontraŭ la arbitraĵoj kaj subpremado („Sur la kampo“, „Hajlo“). Post la frakaso de la Ilinden-ribeło (1903), kies preparadon li partoprenis, en lia poezio eksonis pessimismaj motivoj. . . Tiu ĉi treege talenta poeto asertis, ke li neniam amis la poezion, ke li estimas precipe homojn agemajn, okupiĝantajn senpere pri socia agado, homojn similajn al Goce Delĉev (gvidanto de la Makedona Interna Revolucia Organizaĵo).

Javorov postlasis al la generacioj admirindajn versaĵojn pri la pura amo ne ombrigita de maldelikata voluptemo, kaj samtempe, en la ciklo „Reginoj de la nokto“ li prikantis la „bruligajn dezirojn“, la „kapturitan kirlon“ de la pasioj.

Aŭtoro de ĉefverkoj de la civitana liriko, permesantaj al multaj liaj samtempuloj vidi en li „heredanton“ de Hristo Botev en la poezio, pli malfrue li kreis senmortajn modelojn de l'intima-psikologia liriko.

Poeto deklarinta kulton por la beleco, li

P. K. JAVOROV



P. K. Javorov (1878—1914)

tamen unua enkondukis en la bulgaran poezion la „malbelegan“, la „teruran“, kompreneble, donante al ili estetikan formon.

Estante nur 36-jara, Javorov travivas pezan familian dramon. Post malsukcesa provo sin mortigi, li eble revenus al la vivo kaj al sia kreado, se ne estus la kruela maljusteco de la tiamaj juĝsistemo kaj socio, kiuj devigis lin ĉi-foje apliki samtempe venenon kaj revolveron. Sed tiuj, kiuj estis plej kulpaj pri lia perejo, ne povis supozi, ke post sia morto la poeto eterne apartenos al Bulgario kaj al la mondo.

Stojan KAROLEV

ARMENOJ

Veindaj vaguloj. . . Fragmento malgranda
De ĉiam heroo popolo-martir',
Infanoj de lando — sklavin' suferanta,
Viktimoj de granda liberosopir'!
Pelitaj fremdlanden, en aĉa drinkejo,
Mizeraj kaj palaj, kun kora angor'
Drinkadas, kaj sangas la koroj pro veo,
Kaj kantas, sed kiel oni kantas en plor'.
Ebriaj, ja ili forgesos facile
Malnovajn suferojn, angorojn, de l'kor',
En vinon memoron dronigos ja ili,
Ekdormos malsana spiri' en dolor';
La kapo ekpezos, kaj estos for tiam
De l'kara patrin' la malgoja figur',
Kaj ili ne aŭdos, en plena ebrio,
La lastan plorkrion pri help' en terur'.
Kaj kiel ŝafaro de lup' dispelita,
Tra l'mondo nun ili vagadas sen hav' —
Tirano rabia je sango avida
Al ili konstante minacas per glav'.
Lasinte la povran patrujon sanganta,
Lasinte, ke brulu en flamoj la hejmn',
Vaguloj mizeraj en fora fremdlando,
Por ili nun restas nur voj' — al drinkej'!

Kaj estas sovaĝa kantado ilia,
Ĉar korojn korodas kruela dolor',
Ĉar ilin sufokas malico rabia,
Kaj larmojn elpremas mordanta angor'.
Ĉar korojn premitajn plenigas amaro,
Ĉar kapojn sekigas brulanta venen',
Ĉar fulmas minace ilia rigardo,
Ĉar veng', veng' parolas el ĉies mien',
La vintra ventego kunkantas la kanton,
Ĝi muĝas kaj hurlas tra l'nokto kun ĝi,
Kaj kirle ekkaptas, kunportas tra l'kampoj
La kanton ribelan kun plia rabi'.
Kaj ĉiam pli nigras la nokta ĉielo,
Kaj plie koleras la frosta veter',
Kaj ĉiam pli ardas la kanto ribela,
Kaj ĝin akompanas la ŝtorma koler'.
Drinkante kantadas. . . Fragmento malgranda
De ĉiam heroo popolo-martir',
Infanoj de lando — sklavin' suferanta,
Viktimoj de granda liberosopir'.
En aĉa drinkejo, en vestoj ĉifonaj,
Pelitaj fremdlanden, kun kora angor'
Drinkadas, ĉar volas forgesi malbonojn,
Kaj kantas, sed kiel oni kantas en plor'!

Tradukis: Asen GRIGOROV

INTERNACIA SOMERA E-UNIVERSITATO (ISEU)

(18—24-a de julio 1983, Veliko Târnovo — Svištov)

Estonte la Internacia E-Universitato en Veliko Târnovo okazos ĉiujare. Ĝiaj celoj estas: altigi la ĝeneralan kaj lingvan nivelon de la partoprenantoj; krei amikajn sentojn trans la landlimoj; eduki internaciismon, pacamon, humanismon; manifesti Esperanton kiel efikan instrumenton de kultura interŝanĝo kaj altigi ĝian aŭtoritaton antaŭ la ekstera publiko.

Prelegantoj estos elstaraj esperantistoj — sociagantoj, sciencistoj, fakuloj en diversaj sferoj de la scienco, tekniko, kulturo, arto, interlingvistiko, esperantologio. Karaktero de la prelegoj — popularscienca. Post ĉiu preleĝo estos diskutoj.

Jam donis sian konsenton prelegi: prof. d-ro Paul Neergard el Danlando (membro de la Akademio de Esperanto), doc. Arpad Mathé el Hungario, prof. Kiril Popov, prof. Vasil Cočov, Nikola Aleksiev, Belka Beleva — ĉiuj el Sofio, prof. Pejčev el Plovdiv.

La prelegoj okazos nur antaŭtagmeze. Posttagmeze estos promenoj tra la urbo, konatiĝo kun ĝiaj vidindaĵoj, ekskursoj al interesaj lokoj — vilaĝo Arbanasi, la monaĥejo kaj groto de Drjanovo, urbo Gabrovo kaj la Etnografia Muzeo „Etăr“. Vespere estos kulturprogramoj, amuzado, folkloraj kaj modernaj dancoj, renkontiĝoj kun la lokaj esperantistoj.

Preleĝoj: la Universitato „Cirilo kaj Metodio“ en Veliko Târnovo kaj la Supera Ekonomia Instituto en Svištov.

Loĝado kaj manĝado — en studentaj loĝejoj kaj mangejoj.

La partoprenantoj pagos nur por manĝado kaj loĝado — la transportelspezojn por ekskursoj kaj de Veliko Târnovo ĝis Svištov prenos sur sin Bulgara E-Asocio.

Kotizoj: por bulgaroj — 50 levoj, por eksterlandanoj — 80 levoj.

Bulgaroj sendu la pagon per poŝtmandato al adreso: Dârjavna Spestovna Kasa, smetka 185—I—5745 na Okrâjno Esperantsko Râkovodstvo, 5000 Veliko Târnovo, Bulgario.

Eksterlandanoj anoncu sin kaj sendu aliĝilon. Ili povas pagi surloke, ĉe la alveno.

Oni rajtas pagi nur studkotizon de 15 levoj, se oni deziras partopreni nur la studprogramon kaj la ekskursojn, havante loĝejon kaj manĝon ĉe amikoj aŭ parencoj.

La kotizojn kaj aliĝilojn bonvolu sendi ĝis la 15-a de junio.

Alveno en Veliko Târnovo kaj enloĝiĝo — la 17-an de julio. Akceptejo — en la Universitato.

Pliajn informojn petu de la Centra kaj Distrikta Estraroj de BEA.

Partoprenu la unuan sesion de ISEU! Por vi tio estos neforgesebla travivaĵo!

CE DE BEA PRIDISKUTAS

SIAN MASTRUMAN AGADON

La 26-an de marto de la kuranta jaro la Centra Estraro de BEA okazigis en Sofio specialan kunvenon kun reprezentantoj de la distriktaj kaj societaj estraroj de BEA el la tuta lando por pridiskuti la eblecojn kaj perspektivojn pri disvolviĝo de la mastruma agado surbaze de ŝtataj dokumentoj, aprobantaj la organizadon de simila agado fare de diversaj institucioj kaj organizaĵoj.

Post enkonduka parolado de la prezidanto de BEA Hristo Gorov, pri du gravaj ĉefaj dokumentoj — „Instrukcio pri la specifaj principoj de mastruma agado fare de la E-organizaĵoj de BEA“ kaj „Regularo pri akiro kaj elspezo de monrimedoj el fonduso „Esperantista Agado“ de BEA“ raporton faris la respondeculo de Komisiono pri Mastruma Agado

ĉe BEA — Dimităr Mutuŝev.

Li detale klarigis kion celas CE de BEA, iniciatante similan agadon — faciligi la dezirantojn okupiĝi pri mastruma agado kaj enspezi monrimedojn por la fonduso de BEA, kiuj ebligas la pluan disvastigon de Esperanto en nia lando, la financadon de diversaj kulturklerigaj iniciatoj de CE de BEA.

La vigan diskutadon de tiu sendube grava problemo partoprenis multaj el la reprezentantoj de la distriktaj kaj societaj estraroj: G. Akaliev (Ruse), N. Poparov (Gabrovo), T. Mitov (Haskovo), K. Pančev (Ruse), P. Gospodinov (Pleven), D. Dančev (Plovdiv), B. Atanasov (Bankja), M. Marinov (Sofio), J. Jordanov (IEK) k.a.

Ili ĉiuj turnis atenton al iuj malfacilaĵoj

ekzemple, la financa dokumentado, kaj petis aprobon de la dokumentoj, proponitaj por pri-diskuto fare de la plej altaj ŝtataj instancoj.

En siaj eldiroj Hristo Gorov, G. Dolapčiev kaj D. Hitrov alte pritaksinte la gravecon de tiu ĉi iniciato, turnis specialan atenton de la popularigo kaj disvastigo de Esperanto.

La prezidantoj de la distriktaj kaj lokaj E-organizaĵoj devas strikte diferencigi la instruon, propagandan kaj klerigan E-agadojn


disde la mastruma agado por akiro de monrimedoj.

Pri la gvidado kaj la financa kontrolado de l'mastruma agado en la E-societoj devas okupiĝi fakuloj. Nur tiamaniere niaj E-organizaĵoj sukcesus plenumi du gravajn taskojn: en-spezante monrimedojn per celkonforma mastruma agado, ankoraŭ pli sukcese popularigi kaj disvastigi Esperanton.

D. S. H.

Niaj aktivuloj

KUN JUNULARA ARDO



Plovdiv, la dua laŭ grandeco urbo en Bulgario, havas riĉan kulturen vivon. Modeste, sed ĉiam pli inde ankaŭ la loka esperantistaro kontribuas al la diversflanka urba kulturo.

Kamarado Dimitar Dimitrov estas unu el la fervoraj junaj E-agantoj. En daŭro de kelkaj jaroj li serioze okupiĝis pri Esperanto kaj sendube li bone lernis, ĉar sian lastan ekzamenon pri pedagogia sperto Dimitrov faris brile antaŭ la bonega E-lektoro Kunčo Vălev. Nun li estas membro de Distrikta Estraro de BEA — Plovdiv — kaj respondecilo pri la E-instruado.

Malgraŭ sia okupateco kiel gimnazia instruisto kaj gvidanto de la lerneja praktiko de estontaj instruistoj, li trovas tempon labori en la Esperanta agadkampo. Gis nun nia juna samideano Dimitrov gvidis kelkajn E-kursojn de societo „Kulturo“. Li ankaŭ laboris en la internaciaj E-kursejoj en Pisanica kaj Eger (Hungario). Dimitrov lerte gvidas konversaciajn rondojn en la Distrikta Domo de Instruistoj kaj en la Domo de Medicinistoj. Li ĉiam pretas plenumi socian taskon: fari modelan lecionon, kunorganizi regionan konferencon, prelegi en solena kunveno aŭ reciti en Novjara festo.

Taskoj de Dimitrov kiel respondecilo pri la instruado estas ankaŭ organizi kaj kontroli kursojn kaj fakultativajn grupojn, gvidatajn de aliaj kursgvidantoj. Dimitar Dimitrov estas aparte kontenta, kiam oni sukcesas organizi E-kursojn por instruistoj. Vi devus vidi lian optimistan rideton, kiam li diris: „Ni baldaŭ havos sufiĉe da novaj instruistoj kaj tiam ni povos organizi pli multe da kursoj kaj fakultativaj grupoj.“

Dank' al la iniciatemo de Dimitrov la plovdivaj kursgvidantoj disponas pri senĉese pliriĉiganta materiala bazo: skribprojektoro, diaskopo, magnetofono, bildoj, ĉartoj k.t.p.

Kaj ĉiam novaj ideoj, novaj planoj por pri-diskuti kun siaj pli aĝaj gekolegoj... Estu pli multnombraj la junaj E-agantoj kiel Dimitar Dimitrov.

L. ALEKSANDROVA

ABONU E-GAZETON „BUDAPEŝTA INFORMILO“!

Dank' al la afableco de la redakcio de nia frata E-gazeto „Budapeŝta Informilo“ ĉi-jare ni ricevas ĉiunmonate po 60 ekzemplerojn, kiuj estas aboneblaj per poŝtmandato al la konto de Bulgara Esperantista Asocio, 185/1052 DSK-Blagoevski rajon, Sofio — por abono de „Budapeŝta Informilo“.

Tutjara abono por 1983 kostas 3 levojn.

Ni disponas pri 60 abonoj. La dezirantoj bonvolu aboni la E-gazeton kiel eble plej baldaŭ.

Enlanda movado

SUKCESA E-AGADO

La 3-an de februaro k.j. E-societo „Septembra Gloro“ — Mihajlovgrad okazigis sian jarkunvenon. Ĝin ĉeestis An. Zamfirov — prezidanto de Distrikta Estraro de BEA.

En la raporto estis substrekite, ke la vicoj de la E-movado en Mihajlovgrad plimultiĝis, oni atingis sukcesojn en landaj E-araĝoj (revuoj kaj konkursoj). Plej aktivaj membroj estas Dobrinka Todorova, Mariana Evlogieva, Cvetan Milanov, Ivanka Todorova, Bojanka Miĥajlova, Malina Krasteva, Anelija Stoeva, Ljubka Metodieva, Bojĉo Kirilov kaj Georgi Borisov.

Dum la raportita periodo estis organizitaj kvin kursoj (tri civitanaj kaj du instruistaj) por lernado de la Internacia Lingvo Esperanto. En la kuranta lernojaro oni fakultative lernas Esperanton en ses mezlernejoj.

En la Dua Infana Asembleo „Standardo de la Paco“ partoprenis Svetlozar Ljubomirov kaj Staju Kasabov — infanoj-esperantistoj el la societo.

En la akceptita agadplano dum 1983 elstaras iniciatoj, dediĉitaj al la 60-jara jubileo de la Septembra Ribelo en 1983. La aliaj arangaĵoj estas konformigitaj al la kalendara plano de Centra Estraro de BEA.

N. TIŠKOVA

„VEKIGO“ AKTIVADAS

La jarkunvenon de E-societo „Vekigo“ — Sumen ĉeestis multaj esperantistoj. Gastoj estis la dojeno de la E-movado en Sumen — Atanas Bojaĝiev, la prezidanto de Distrikta Estraro de BEA — Sumen, Veska Dragostinova kaj la prezidanto de ŝumena E-societo „Sano“ ĉe Distrikta Hospitalo — d-ro Ljudmil Conov.

Priagadan raporton de unu el la plej malnovaj landaj E-societoj faris ties prezidanto Cvjatkio Todorov. Solene estis celebrata la 100-jara datreveno de Georgi Dimitrov. Krome oni presigis kaj dissendis tra la tuta mondo foliojn en Esperanto pri liaj verkoj kaj agado. Okazis kunvenoj pri la 60-jara jubileo de Sovet-Unio kaj la 75-a datreveno de BEA. Estis organizitaj multaj vesperoj de la internacia amikeco, gastadoj, celebroy, ekspozicioj de materialoj kaj leteroj de korespondantoj.

En la Ekonomia Mezlernejo kaj Dua Gimnazio en Sumen funkcias du kursoj sub la gvido de Maria Trendafilova kaj Stefan Georgiev, kiuj kompletigos per gejunuloj la vicojn de la ŝumena esperantistaro.

Multaj estis la eldiroj pri la raporto. Estis esprimita kontentigo de la realigitaj iniciatoj kaj estis faritaj rekomendoj pri la estonto. Raportante, ke E-societo „Vekigo“ disvolvis celdirektitan kaj utilan agadon, oni difinis taskojn por pli aktiva laboro dum 1983.

La ĉeestantaj membroj elektis novan estraron.

Vasil GRADINAROV

JARKUNVENO DE „LUMO“

La 26-an de januaro en Plovdiv societo de blir-daj esperantistoj „Lumo“ okazigis sian jarkunvenon. Ĉeestis Jordan Angelov kaj Fani Miĥajlova — resp. prezidanto kaj sekretario de Distrikta Estraro de BEA — Plovdiv. En la priagada raporto detale estis pritraktita la societa agado.

En Plovdiv estas 30 blindaj esperantistoj. La plimulto el ili bone posedas Esperanton kaj sukcese uzas ĝin en sia ĉiutaga praktiko. Funkcias du E-kursoj.

Naŭ blinduloj havas regulan korespondadon kun siaj samsortanoj el diversaj landoj. La plejparto de la nevidantaj esperantistoj ricevas brajligitajn revuojn kaj tiamaniere havas aliron al aktualaj informoj.

Oni akceptis decidojn pri okazigo de multaj E-araĝoj kaj interesaj iniciatoj dum la kuranta jaro. Okazos jubilea solena kunveno okaze de la 25-jariĝo de la E-societo. Niaj reprezentantoj partoprenis en la ĉi-jara Nacia Revuo de E-Parolo kaj Kanto en Kazanlâk. Multaj esperantistoj el la societo preparas sin por partopreni en la Universala Kongreso ĉi-somere en la hungara ĉefurbo Budapeŝto.

La plovdivaj blindaj esperantistoj per sia modesta, sed varia agado kontribuas por disvastigo de la Internacia Lingvo kaj ties praktika uzo.

Danĉo DANĈEV

15 JAROJN E-SOCIETO „FERVOJISTO“

La 26-an de februaro k.j. en Stara Zagora solene estis festita la 15-jara jubileo depost la fondiĝo de la loka E-societo „Fervojisto“.

En la luksa salono de la nova stacidomo de Stara Zagora kolektiĝis pli ol 50 esperantistoj el la urbo kaj reprezentantoj de E-societoj el la distrikto. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de Fervojista Sekcio de BEA Marin Marinov kaj ties kasistino Adriana Georgieva.

Koncizan, sed enhavoriĉan raporton faris la sekretario de la societo Todor Todorov. Li bildece prezentis la riĉan kaj varian vivon de la societanoj. „Fervojisto“ okupas unu el la avangardaj lokoj inter la landaj fervojistaj societoj per sia vastskala organiza kaj internacia agado. Indas elstarigi la bonegajn ligojn inter la estraro de E-societo „Fervojisto“ kaj la estraroj de la Kulturdomo de Transporto — Stara Zagora kaj loka stacidomo. Estas permesite starigi Esperantan tabulon apud la informejo de la stacidomo.

La societa agado estis alte pritaksita de la prezidanto de Fervojista Sekcio de BEA M. Marinov, de la prezidanto de Distrikta Estraro de BEA Petko Bonev kaj de aliaj gastoj.



Partoprenantoj en la XV jubilea festo de E-societo „Fervojisto“ — Stara Zagora

La jubileanta societo ricevis donace de Fervojista Sekcio de BEA skulptitan buston de Zamenhof kaj E-librojn. Ili kune kun aliaj donacitaj E-libroj estas fundamento de la establita societa biblioteko.

Post amika tagmanĝo la solenaĵo daŭris ĝis malfrua posttagmezo. Okazis personaj interparoloj, dancoj kaj projekciado de diapozitivoj el la internacia agado de la societanoj.

Adriana GEORGIEVA

AMASA KUNVENO

La 9-an de marto k. j. en plenplena salono de la Kulturdomo de Transporto — Sofio, estis okazigita amasa kunveno de fervojista E-societo „Prospero“ okaze de la 8-a de marto — Internacia Tago de Virinoj. Ĉeestis multaj gastoj.

Enhavoriĉan raporton pri la signifo de la Internacia Tago de Virinoj tralegis la prezidantino de la societo Verka Stajner. Sekvis interesa literatura-muzika programo, variigita per kvizo kaj loterio. Tanja Arnaudova bone plenumis popoldancon.

La kunveno daŭris, ĉe konvena muziko kaj dancoj, ĝis malfrua vespero.

A.G.

JARKUNVENO DE „DAVID SASONOV“

La jarkunveno de E-societo „David Sasonov“ — Asenovgrad, okazis la 13-an de februaro k. j. Ĉeestis pli ol 90 esperantistoj kaj gastoj.

Oni raportis pri multaj iniciatoj, okazintaj dum la pasinta unujara periodo. La plej rimarkindaj estas: celebrego de la 75-jara jubileo de E-movado en Asenovgrad (dum kiu la prezidanto de Centra Estraro de BEA Hr. Gorov distingis niajn veteranojn), sukcesa abonkampanjo (162 abonoj de „BE“), organizo de instruista E-kurso sub la gvido de Deŝka Kaŝarova.

En siaj eldiroj multaj membroj esprimis kontentecon pri la agado kaj bondeziris novajn sukcesojn.

Fine de la kunveno, instruistoj el la nova E-kurso kaj lernantoj el lernejo „Nevena Jordanova“ plenumis belartan programon.

Emil ĈIRPANSKI

INFORMO

E-societo „Kulturo“ — Ruse de la 7-a ĝis 17-a de oktobro 1983 organizas ekskurson al Sovet-Unio laŭ jena itinero:

Ruse — Odeso per trajno kaj ŝipo, Odeso—Jalta—Soĉi—Suhumi—Batumi—Novorosijsk—Odeso per ŝipo, Odeso—Ruse per trajno aŭ aŭtobuso.

La veturado per soveta luksa ŝipo „Gruzija“ (Georgio) estas tre agrabla. Estas antaŭviditaj renkontoj kun esperantistoj en Odeso, Soĉi kaj Novorosijsk.

Prezo: ĉirkaŭ 350 lv. plus 102 lv. por monŝanĝo. La lokoj estas nur 40.

Por informoj kaj enskribiĝo: 7000 Ruse, p.k. 208, Stojĉo Todorov Cankov, hejma tel.: 3-25-58.

RUMANAJ GASTOJ

La sofiaj esperantistoj havis karajn gastojn el urbo Roman, Rumanio. La grupo konsistis el naŭ geesperantistoj kun gvidanto Konstantin Barjoveanu.

Invitite la rumana E-grupo vizitis la oficejon de Urba Estraro de BEA — Sofio. Ties vicprezidanto Haim Levi prezentis la agadon de Urba Estraro, ĝiajn planojn kaj taskojn. La gastoj restis surprizitaj de la granda morala kaj materiala helpo, ricevata de la ŝtato.

K-do Barjoveanu rakontis pri urbo Roman kaj la tiea E-laboro. Danke li donacis al Urba Estraro siajn afiŝojn kaj desegnaĵojn pri Esperantaj kaj pacaj temoj.

La rumanaj geesperantistoj trarigardis la vidindaĵojn de Sofio. Poste ili forveturis al la nigramaraj urboj Varna kaj Burgas.

Ljuben GROZDANOV



Renkontiĝo kun rumanaj esperantistoj en Sofio

AGRARA SOCIETO FONDITA

En Klubo de Ordenportanto — Jambol okazis fonda kunveno de la unua societo de agrikulturaj specialistoj-esperantistoj en Bulgario. Ties membroj estas agronomoj, zooteknikistoj, ekonomiistoj kaj aliaj agraraj specialistoj el Jambol. Gasto de la jambolaj esperantistoj estis Sterju Kukuŝev, prezidanto de Internacia Ligo de Agrikulturaj Specialistoj-Esperantistoj (ILASE) kaj ĉefredaktoro de „Internacia Agrikultura Bulteno“.

Pri la signifo de la internaciaj kontaktoj inter agrarspecialistoj parolis Sterju Kukuŝev kaj Penka Papazova. Laŭ la akceptita statuto celoj de la novefondita societo estas: starigi ligojn kun agrikulturaj specialistoj el ĉiuj landoj, ricevadi sciencajn informojn, arangi reciprokajn gastadojn por interŝanĝi spertojn en la agrikulturo.

La ĉeestantoj akceptis Alvokon al la agrarspecialistoj-esperantistoj el la tuta mondo pri kunlaborado kaj interŝanĝo de scioj, pri kuna batalo por paca kunekzistado.

Honora prezidanto de la societo estis elektita d-ro de agr. sc. Văljo Vălev. Prezidanto estigis Penka Papazova (agronomo), kaj sekretario — Stefka Pejĉeva.

Angelina ANGELOVA

AMIKO DE ESPERANTO

La Distrikta Komitato pri Pacdefendo — Sumen, organizis solenan kunvenon okaze de la 75-jara jubileo de la aktiva batalanto kontraŭ faŝismo kaj elstara multjara aganto de la pacmovado ANGEL VIDE-NOV.

La jubileulo estas arda adepto de la Internacia Lingvo Esperanto, granda amiko de la esperantistoj en urbo Sumen kaj ties distrikto. Multfoje li partoprenis E-arangojn, faris prelegojn pri la pacdefendo antaŭ esperantistoj kaj kontribuis por subvenciado de la E-agado.

Inter la prezentitaj al li multaj floroj, gratuletoj kaj donacoj de diversaj instancoj, estis ankaŭ tiuj de la ŝumenaj esperantistoj, kiujn Videnov akceptis kun ekkrio: „Vivu Esperanto! Vivu la paco!“

Cvjatko TODOROV

RENKONTIGO DE E-TEATROJ EN BUDAPEŬTO

La Internacia Renkontigo de E-Teatroj en Budapeŝto de la 18-a ĝis 27-a de marto okazis enkadre de Budapeŝta Printempa Festivalo '83.

En la Renkontigo, okazigita en la salono de Stata Dramteatro „Miklos Radnoki“, partoprenis hungaraj kaj bulgaraj teatraj E-trupoj kaj soldaj plenumantoj. La programo estis riĉa, varia, je alta artisma kaj lingva niveloj.

La Hungara E-Teatro prezentis la teatraĵon en du aktoj „Cu vi vidis jam la piedsignon de l'Profeto?“ de Janos Elem, la unuaktajn teatraĵojn „La lasta magnetofonbendo de Krapp“ de Samuel Beckett kaj „La mortintoj de Spoon-River“ de Edward Lee Masters, kaj ankaŭ du poeziajn recitalojn: „Literatura programo“ — plenumita de merita artistino Ildiko Pecs kaj „Petöfi“ en bonega plenumo de Gabi Jobba — artistino de la Nacia Teatro.

La bulgara partopreno okazis en jena ordo:

— la 21-an de marto k.j. ni prezentis la modernan italan komedion en tri aktoj „La rozoj“ de Aldo de Benedetti. Partoprenis: Belka Beleva, Anani Anev, Mihail Cobanov kaj Angelina Sotirova.

— la 26-an de marto — „Divorco“, soveta unuakta komedio de Nedeŝda Slonova, en plenumo de Belka Beleva kaj Anani Anev; en la oficiala Parada Revua E-Programo, en kiu partoprenis ankaŭ hungaraj artistoj.

— la 27-an de marto — ni prezentis duan spektaklon de la komedio „La rozoj“, per kiu estis solene fermita la Festivalo. La saman vesperon okazis Internacia Tago de Teatro B. Beleva laŭlegis Mesagon al la pachtalantoj kaj la ŝatantoj de teatra arto.

Konsiderante la ĝenerale altan artan nivelon de la Festivalo, la entuziasmajn aplaŭdojn de la publiko, 5—6 bisojn sur la sceno, la gratulojn de la organizantoj Benczik kaj Pethes, de la reĝisoro Laszlo Romhanyi, de la sekretario de HEA Tibor Vasko, de hungaraj esperantistoj, la multajn florkronojn kaj donacojn, ni kontente povus deklari, ke niaj gastludoj en la Budapeŝta Printempa Festivalo '83 pasis tre sukcese kaj ni honore prezentis nin.

Anani ANEV

BUDAPEŬTO — ĈEFURBO DE GROTOJ

Ne ekzistas alia ĉefurbo, sub kiu treniĝus kilometroj da grotoj. La mirinda panoramo de Budapeŝto altiras grandajn amasojn de turistoj, sed malmultaj scias, ke la profundaĵoj de Buda-montaro proponas juvelojn al la vizitanto.

Sur la areo de nia ĉefurbo antaŭ 200 milionoj da jaroj ondis „Theys“-maro, kaj apenaŭ antaŭ 60 milionoj da jaroj Eocena maro postlasis dikajn tavolojn de kalkŝtono kaj dolomito. En la pliocena epoko sekigis la tuta Karpat-baseno, ĝi travivis movriĉan epokon, la montoj estiĝis kaj foriĝis.

La Buda flanko leviĝis kaj la Peŝta malleviĝis en profundajon de mil metroj dum grada geologia katastrofo. El la profundaĵo impetis termakvoj en la tektonikajn fendegojn, kiuj koroziis kaj dilatit ilin. La termakvo sekvis la genezon de Danubo-valo, kaj dum miljaroj kreigis la grotoj.

Hodiaŭ ni jam konas ĉi-loke pli ol 25 kilometrojn de groto-koridoroj. La plej granda estas „Mátyáshegyi“, vizitebla nur al speleologoj. Ĝi estas 5 kilometrojn longa labirinto sen stalaktitoj kaj stalagmitoj. Ducent metrojn sude de tiu groto, en 1904 oni komencis esplori la groton „Pal-völgy“ (Paŭlo-lavo), kaj en la jaro 1927 ĝi estis malferrita por turistoj. Ĝi estas ekipita per betonaj trotuaroj, ŝtuparoj kaj elektraj lampoj. Generacioj da hungaraj speleologoj konatigis en

tiu groto kun la tekniko de la grot-esplorado. En 1980 oni malkovris novajn galeriojn, kaj hodiaŭ la groto havas longon de pli ol 3 km. El tiuj eblas spektu 400 metrojn. Galerioj de la groto ebligas bonege studi la agadon de la pratempaj termakvoj, kaj tiun de tektonikaj efikoj. Sur la muroj de kelkaj galerioj troviĝas belaj kristaloj de kalcito, fosiliaj konkoj, stalagmitoj kaj stalaktitoj. La plej granda ĉambrego de la groto, „Teatro-ĉambrego“ havas boran akustikon, ĉank'al kiu eblas aŭskulti klasikan muzikon pere de magnetofono. La groto estas malferrita vendrede, sabate kaj dimanĉe inter la 9—16-a horoj. Ĝi estas proksime al la placo Kolosy, kaj atingeblas per la aŭtobusoj n-ro 29 kaj 65.

(El „Budapeŝta Informilo“, 4/82)

ESPERANTO EN LA FRANCAJ LERNEJOJ

La 8-an de februaro k.j. komisiono kunvenis por kunmeti novan leĝproponon pri instruado de Esperanto en francaj lernejoj. Konforme al la jam prezentita leĝpropono de 1979, sed kun modifoj por instruado ankaŭ en la unuagradaj lernejoj.

Kunvenis en oficejo de la Parlamento deputito André Delehedde, respondeculo pri edukaj aferoj en la Socialista Partio kaj eminentaj esperantistoj, inter kiuj prof. Janton, instruanto pri angla lingvo kaj Esperanto en la Universitato de Clermont-Ferrand kaj R. Levreaud, vicprezidanto de Franca Esperanto-Instituto.

Oni prezentos la novan tekston al la Parlamento en aprilo.

UNIO FRANCA POR ESPERANTO

NI KONDOLENCAS

La 17-an de marto 1983 forpasis en Sofio la meri toplena bulgara esperantisto

MIHAIL NIKOLOV ŜEKERĜIEV

Li estas naskita en Sliven en 1903. Mezlernejon li finis en Varna kaj poste enoficiĝis en banko. En bankoj en Burgas kaj Sofio li laboris kiel oficisto kaj okupis gravan postenon en Nacia Banko.

En siaj junaj jaroj li aliĝis al la revolucia laborista movado kaj aktivis en ties bataloj. M. Ŝekerĝiev eniris la vicojn de Bulgara Komunista Partio kaj fidele plenumis sian socian devon.

Esperanton li eklernis en 1923 kiel gimnaziano. Li partoprenis la fondon de ĝeneralanta E-grupo en Varna en 1924, kiu grupo iniciatis la fondon de Ĝeneralanta Esperantista Ligo en 1926. Dum du jaroj li estis redaktanto de la ligo organo „Esperantska Mladeŝ“ (Esperantista Junularo), aperanta en bulgara lingvo kaj en Esperanto. Dum 1929 li estis vicprezidanto de E-societo „Albatro“ en Varna, gvidis E-kursojn. Li aktive kunlaboris al revuo „Bulgara Esperantisto“ dum la periodo 1925—1931, kaj al la bulgarlingva gazeto „Esperanto“ (1925—1926). Li sperte tradukis el la bulgara belliteraturo — A. Karalijĉev, Hr. Mindov, Vl. Musakov, N. Rajnov, Li estis aŭtoro de altnivelaj originalaj rakontoj en Esperanto, publikigitaj en „Bulgara Esperantisto“, „Norda Prismo“ kaj „La Espero“ (Svedio). „Interligilo“ k.a. En bulgara lingvo aperis en 1925 lia libro „Esperanto kaj la fremdaj lingvoj“ kiel kajero de biblioteko „Zelena Zvezda“ (Verda Stelo).

Mihail Ŝekerĝiev estis ankaŭ bona preleganto. Li multe prelegis pri Britio kaj Islando, pri Hindio, kiun li vizitis kiel turisto, iujn landojn li vizitis dum Universalaj Kongresoj de Esperanto. Tiuj prelegoj, ilustritaj per memfaritaj kolordiapozitivoj, multe propagandis por Esperanto.

Mihail Ŝekerĝiev lasis al ni valorajn E-arkivaĵojn kaj karan memoron pri sia neforgesebla personeco.



BULGARIO

Geinstruistoj el Asenovgrad deziras korespondi tutmonde: Duagrada E-Kurso, p.k. 10, BG-4230 Asenovgrad.

Gelernantoj (11-jaraj) dez. kor. kun ĉl: E-kurso, IVg kl., Učilište „Nevena Jordanova“, BG-4230 Asenovgrad.

Gelernantoj (14-jaraj) dez. kor. tutmonde: E-kurso VIIb kl., Učilište „Otec Paisij“, BG-4230 Asenovgrad. Novaj esperantistoj el urbo Ŝumen dez. kor.:

Anton Bojaĝiev (36-jara), ul. „Aprilsko vŝtanie“ 39, BG-9700 Ŝumen.

Ruĵa Nedeva Kostova (25-jara), ul. „Vladajsko vŝtanie“ 18, vĥ. 4, ap. 9, BG-9700 Ŝumen.

Valentina Dimitrova Petrova (22-jara), ul. „Komsomolska“ 64a, BG-9700 Ŝumen.

Nina Krăsteva Ĥristova (33-jara maŝiningeniero), bul. „Gagarin“ 76, vĥ. 2, ap. 33, BG-9700 Ŝumen.

Donka Stojanova Ivanova, ul. „Alen mak“ 46, BG-9700 Ŝumen.

Sergej Ivanov (30-jara), pl. „Oboriŝte“ 9, BG-9700 Ŝumen.

Junpioniroj (14-jaraj) el urbo Tărgoviŝte dez. kor. kun junpioniroj el Bulgario kaj eksterlando: Vtoro bazovo učilište „N. J. Vapcarov“, BG-7700 Tărgoviŝte.

Maria Todorova Staneva (20-jara), str. „Obnova“ 12, BG-4016 Plovdiv — kun fraŭloj el GDR, Hungario, Pollando, Rumanio, Britio kaj Francio pri muziko, sporto kaj lingvaj demandoj.

Angelina Atanasova Gjaurova (18-jara), BG-4134 v. Skutare, Plovdiv-distrikto — kun junuloj el GDR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Francio.

Nadejda Maneva Sviŝtovlieva (24-jara), str. „Ĵeravna“ 22, BG-4000 Plovdiv — kun geesperantistoj el GDR, Francio kaj Italio pri muziko kaj filatelo, interŝ. bildkartojn.

Petăr Iliev Andonov (30-jara), str. „Baba Donka Ĥristeva“ 13, BG-4004 Plovdiv — kun esperantistoj el ĉiuj landoj.

ĈEĤOSLOVAKIO

Eva Technikova (28-jara komencantino), Smetanova 468, CS-468 41 Tanvald — kun gebulgaroj pri ĉiuj temoj.

HUNGARIO

Lenart Ernő (28-jara elektroteknikisto), Tanachaz u. 22, III-VI-21 — kun ĉl pri turismo, libroj, politiko, muziko, elektrotekniko, fervojaj modeloj.

Toth Erzsébet (58-jara instruantino pri geografio), Muzemkert 19, H-2142 Nagytarcsa — kun ĉl pri artoj, muziko, turismo, naturo, kol. de bk kaj pm.

Ferdinand Vince (19-jara junulo), pf. 36/x, H-8960 Lenti — kun gejunuloj el ĉl pri sporto kaj muziko.

Junaj gekomencantoj dez. kor. tutmonde:

Tibor David (26-jara bindisto), Berva szallo, H-3304 Eger — hobiaj: legado, filmoj, vojaĝoj.

Pal Toth (19-jara tornisto), Berva szallo, H-3304 Eger — hobiaj: legado, vojaĝoj.

Laszlo Kovacs (21-jara tornisto), Berva szallo, H-3304 Eger — hobiaj: filmoj, vojaĝoj.

Jozsef Vereb (19-jara tornisto), Berva szallo, H-3304 Eger — hobiaj: legado, vojaĝoj.

Erzsébet Kovacs (19-jara kemia faklaboristino), Kossuth u. 195, H-3258 Tarnalelesz — hobiaj: brodado, legado.

Margit Kovacs (19-jara kemia faklaboristino), Kossuth u. 195, H-3258 Tarnalelesz — hobiaj: brodado, legado.

Buzas Sandor (35-jara komencanto), H-7081 Simon-touya, Szarvas u. 34/b — kun geesperantistoj pri literaturo, historio kaj kol. de bk.

POLLANDO

Junia geedza paro (27 kaj 30 j.) — J.H. Domak, Esperanto-Klubo DEC, Savickiej 33 m 18, PL-65-559 Zielona Góra — kun junaj geedzoj; reciproka gastado eblas.

Roviald Skoviliski (47-jara instruisto), skrytka 16, PL-87-100 Toruń 1 — kun ĉl pri E-literaturo kaj -aktivado.

Kazimierz Lad (33-jara fraŭlo), Trzemeska 6/35, PL-53-679 Wrocław — kun ĉl pri muziko, turismo; interŝ. pm, bk, mod-revuojn, gramofondiskojn, magnetofonajn kasedojn.

SOVET-UNIO

Kostju Syilvia (21-jara oficistino), str. „B. Ĥmelnickij“ 31, Zakarp. obl., SU-295540 Vinogradovo — dez. kor. tutmonde kaj interŝanĝi bk.

Lernantinoj (16-jaraj) dez. kor. pri diversaj temoj kaj interŝanĝi bk:

Ac Jeva, ul. „Puŝkina“ 88, SU-295516 Nove selo, Zakarp. Beregovskij raj.

Matej Elizabeta, ul. „K. Marksa“ 447, SU-295516 Nova selo, Zakarp. Beregovskij raj.

Cehi Elena, ul. „Gagarina“ 44, SU-295541 Bereĥi, Zakarp. Beregovskij raj.

Baratej Erika, ul. „Sovetskaja“ 47, SU-295528, Zakarp. Beregovskij raj.

Himiĉ Valentina, ul. „K. Marksa“ 46, SU-295516 Nova selo, Zakarp. Beregovskij raj.

Gyergy Katarina, ul. „Lenina“ 112, SU-295511 Ivanovka, Zakarp. Beregovskij raj.

Cehily Svitlana, ul. „Lenina“ 95, SU-295527 Kvasovo, Zakarp. Beregovskij raj.

Simon Irena, ul. „Petefi“ 37, SU-295522 Dobrosilja, Zakarp. Beregovskij raj.

Kun Eva, ul. „Mira“ 19, SU-295514 Bereĥi, Zakarp. Beregovskij raj.

Nagy Ibolya, ul. „Druĵba“ 8, SU-295528 Dedovo, Zakarp. Beregovskij raj.

Gestudentoj de Talinna Politeknika Instituto dez. kor. tutmonde:

Kuzmiĉeva Maja, Loime 22—19, SU-200003 Tallinn — pri klasika literaturo kaj rok-muziko.

Munkov Vladimir, Akadeemia tee 5—520, SU-200026 Tallinn — pri alpismo, E-movado, fotado.

Artamonenko Jurij, Akadeemia tee 5—121, SU-200026 Tallinn — pri muziko kaj radiotekniko.

Sur la unua kovrilpaĝo: Funebra festeno — fresko el la Tombodomo de Kazanlâk

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĂCEV, Vasil BOROVSANSKI, prof. Vasil ĈOĈOV, Dimităr ĤĂĜIEV, Krăstju KARUCIN

Administrantino — Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO

Bul. Ĥristo Botev 97, P. K. 66

1303 Sofio, Bulgario 1 000 Sofio

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, Bul. Lenin 117

MONUMENTO DE LA ANTIKVA ARTO



Fresko el la Tombodomo de Kazanlák

La bulgara tero estas prisemita per unikaj monumentoj de la arto — la ununuraj atestantoj, kiuj, supervivinte jarcentojn, ebligas al ni emocian kontakton kun la epoko, al kiu apartenis iliaj kreantoj. Tiuj ĉi belartaj valoraj konvinke pruvas, ke de pratempe la misio de la krea homa agado, de la altaj homaj celadoj, materiigintaj en milojn da monumentoj, estas servi al la vivo, stimuli la progresemajn ideojn de la socia evoluo, nobligi la homan animon.

Nia lando ĉiam estis originala vojkruĉiĝo, kiun trapasis aŭ kie enloĝiĝis diversaj migrantaj popoloj kun malsamaj kutimoj kaj tradicioj. Multaj el ili — precipe la tracoj kaj prabulgaroj, al kiuj la tero inter Danubo kaj Rodopi-montaro historie apartenas, lasis en ĝi siajn belartajn verkojn — tute malsamajn, kiel la popoloj mem.

Ĉiam ankoraŭ ne estas solvita la problemoj pri aĵoj de la tracoj sur la Balkana Duoninsulo. Sed la fakto, ke ilia influo etendiĝis sur tre vasta teritorio pruvas la arkeologiaj spuroj, kiujn postlasis la tracoj en la skribaj atestoj de la helenaj historiistoj, precipe la Homera *ĉapo*.

La traca hegemonio en la orienta Mediteraneo kaj en Helesponto estas historie pruvita. Kvankam ĉiam ankoraŭ en la sfero de l'mitologio kaj legendoj, ĉiam pli kaj pli reliefigas la malklaraj konturoj de la historia pasinteco de la tracoj, de ilia kultura evoluo kaj politika potenco.

La tracoj tombodomoj sur la teritorio de nuna Bulgario estas veraj arkitekturaj monumentoj, kiuj jetas lumon sur la mondkoncepton kaj la kultajn specifaĵojn de la traca popolo.

Valorega monumento de la traca pentroarto estas la tombodomo apud urbo Kazanlák. Registrita kiel grava monumento de la monda pentroarto, ĝi estas sub la egido de Unesko. La antaŭ nelonge forpasinta eminenta bulgara sociagantino kaj sciencistino Ljudmila Jivkova verkis pri ĝi valoran sciencan esploron sub la titolo „La Tombodomo de Kazanlák“, eldonitan en kelkaj fremdaj lingvoj: angla, germana, franca, rusa ka. Ĝi jam estas bone konata al historiistoj, arkeologoj kaj specialistoj pri pentroarto en multaj landoj.

Malkovrita hazarde en 1944 dum foslaboroj, la Tom-

bodomo de Kazanlák laŭ siaj arkitekturo kaj plano apartenas al la tiel nomataj „kupolaj tombodomoj“. Ĝi konsistas el malfermita ŝtona koridoro (dromos) kun triangula volbo kaj kupola tombokamero (tolos). La dimensioj de la tombodomo ne estas grandaj — ĝi estas longa 5,80 m, sed tamen ĝi havas ekskluzive grandan valoron pro la bonegaj freskoj, posedantaj malsimplan kompozicion, kun figuraj frisoj kaj riĉa ornamo el ripetigantaj geometriaj elementoj kaj plantaj kaj bestaj figuroj, pliriĉigitaj per arkitektonikaj motivoj. La pentritaj kolonoj kreas impreson pri reala aerspaco inter ili, plenigita per la figuroj de tri galopantaj aljungitaj ĉevaloj. La centra figura fresko en la kupola kamero prezentas scenon de funebra festeno. Estas pentritaj la sidantaj figuroj de nobela paro — traco kaj tracino, pompe vestitaj en blankaj roboj kaj manteloj, riĉe ornamitaj per juveloj, ĉirkaŭite de sklavoj kaj sklavinoj. La festeno ĉeestas ankaŭ mizikisto, gardisto kaj ĉevalisto kun selitaj ĉevaloj kaj jungitaj ĉaroj — reala bildo el la vivo de la traca aristokrataro. En la tiel prezentita adiaŭa sceno estas spegulita la eterna homa dramo kaj la kredo de la antikvaj tracoj je senmorteco.

La freskoj en la Tombodomo de Kazanlák ne sekvas strikte la kanonojn de la helenaj pentroarto. Rilate la kompozicion kaj portretojn la pentristo donis propran originalan solvon. La vigleco de movoj de la prezentitaj figuroj, la kolorefektoj, la riĉaj ornamelementoj kreas veran ĉefverkon de la antikva traca arto. La grando de helaj kaj malpli helaj kolornuancoj faras la figurojn vivaj kaj plastikaj. Kulmino de tiu ĉi arta



Fresko el la Tombodomo de Kazanlák

majstreco estas la bonege esprimitaj kaŝita forto kaj streĉiteco en la movoj de la galopantaj ĉevaloj.

La freskoj en la tombodomo datigas de la frua helenaj epoko — de la fino de IV jc. antaŭ nia erao.

La Tombodomo de Kazanlák estas beleaga verko de la tracoj artaj tradicioj, rezultantaj el la realaĵoj mem. Ĝi estas esprimo de rafinita belarta kompreno de la spiritaj valoraj, propra nur al la plej bonaj verkoj de la monda pentroarto.

Doc. ing. Nora VÁLKOVA

